

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)


**Pri lingvo kaj
homaj rajtoj
en Ĝenevo**



**Estrara Raporto
1997**



**Kongresurboj
por la jaroj
2000 kaj 2001**



Jubilea tosto en la Masto

Vi trovos...

100 **Malferme**

Pensante pri mono

Osmo Buller

101 **NOVA PORDO ĈE UN MALFERMITA**

En Palaco de Nacioj oni diskutis pri lingvo kaj homaj rajtoj.



Arkivo de UEA

104 **Malferma Tago**

Jubilea svarmo en etoso varma

106 **Estraro de UEA**

DU KONGRESURBOJ DECIDITAJ

107 **Estrara Raporto**

UEA EN 1997

Ĝeneralaĵoj

Viglaĵ kontaktoj kaj diskutoj

108 **Administrado**

Servoj sub laborpremo

Kampanjo 2000

Ambicia lanĉo

Financo

Forteco super atendo



Foto: F. Veuthy



109 **Kongreso**

Sukceso preter horzonoj

Revuoj

Vasta temaro

110 **Landa kaj regiona agado**

Senfanfarona solidaro

Eksteraj rilatoj

Daŭra elano

111 **Informado**

Du minutoj da CNN

112 **Kulturo**

Valorojn gardi kaj krei

Instruado, edukado

Por packulturo

Faka agado, scienco

Sur bonaj reloj

Lingvo, esploro kaj dokumentado

Nova direkto interlingvistika

113 **Junularo**

TEJO aŭdigis sian voĉon

114 **Financaj aldonaĵoj**

Spezokonto

115 **Bilanco**



Foto: Komitato de Bill Mak



Komitato de I. Gajdos

Foto: Kam S. Lee

Kaj plue...

116 **LOKE, PERSONE**

117 **FAKE**

118 **Edukado**

Al interkulturo per Esperanto

Mauro La Torre



El Unesco Sources, jan. 1998

119 **LASTE APERIS**

120 **NEKROLOGOJ**

La kovrilo: Louis C. Zaleski-Zamenhof kaj Birthe Lapenna bankedas en Euromast.

Malferme: Ĝenerala Direktoro O. Buller

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Grafiko: Francisco L. Veuthy.

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



PENSANTE PRI MONO

Ĉiu asocio devas pensi pri mono, des pli, ju pli granda ĝi estas. En Esperantujo UEA estas la plej granda kaj ĝiaj monpensoj do la plej grandciferaj.

Kutime la gvidantojn de UEA cerbumigis ne-sufiĉo de mono. Ekde 1983 la spezokonto havis minusan saldon, t.e. elspezoj superis enspezojn kaj oni devis kovri la mankon per preno el la kapitalo. Feliĉe, samtempe ankaŭ venis mono al la kapitalo, dank' al heredaĵoj kaj donacoj. Ili superis la elprenojn kaj tial la kapitalo ne ŝrumpis sed daŭre kreskis.

Eta minuso ne indas kapdoloron, ĉar nula saldo ne eblas kaj profiton ni ne celas. En iuj jaroj la breĉo tamen estis netolerebla kaj prave elvokis alarmojn. En 1991 ĝi tiom faŭkis (88 010 gld.), ke du oficistaj salajroj povis iri tra ĝi. Iuj hastis konkludi ke tro multas la oficistoj. Tian rezonon mi ĉiam trovis mistrafa. Profesia stabo certigas la kvaliton kaj glatan funkciadon de la servoj kiujn la membroj mendas kotizante. La vera problemo estis kaj restas, ke la stabo tro malgrandas kaj devas ŝvite kromlabori kaj forgesi feriojn. Miaj kolegoj ŝajne posedas la Internan Ideon en siaj vejnoj, ĉar aliloke tio ne eblas...

Foje ni legas ke la administracio de UEA estas peza kaj voras monon for de "agado". Tamen, plejparto de la laboro en la CO estas ne-administra. Redakti, provlegi kaj grafikumi revuojn kaj librojn, aŭ prepari

UK, estas agado. Kaj ĉu libroservisto estas balasta burokrato, se per librovendoj UEA gajnas pli ol lian salajron? Ankaŭ KKS-n oni ne bezonas salajri el la kotizoj, kaj grafikaj servoj al eksteruloj donas ekstrajn enspezojn. Multo tamen estas farata ekster la CO: ekz. UK estas enorma volontula projekto kaj libroj grandparte estas pretigataj ne-oficiste.

Kiel do ekde 1992 la minuso reduktiĝis, se ni maldungis neniuon? Ĉar malpli da mono iris ekster la movadon: ni sciis pli ekonomie presi, ekspedi, aĉeti ktp. Paradoxse: ju pli ni tiel ŝparis, des pli grandan porcion el la kostokuko prenis salajroj: 58,0% en 1991 kaj 67,1% en 1997. Tio tamen ne signifas pli pezan administracion sed pli efikan mastrumadon. En 1997 la kostoj estis nur 9 470 gld. (1,1%) pli altaj ol en 1991, sed la rimedoj pli altis 77 720 gld. (9,7%)!


Mallonge: dum la lastaj ses jaroj la financoj de UEA plisaniĝis. Ĉi-supre mi skribis nur pri la spezokonto. La bilanco registris eĉ pli radikale pozitivan evoluon, kaj ĝuste ĝi bildigas nian financon fundamenton. La sukceson de la spezokonto ĉefe ellaboris miaj kolegoj. Mi vere fieras pri ili. La pli fortan bilancan bazon ni dankas al niaj grandanimaj mecenatoj. Ili zorgas pri sia asocio pli efike ol financaj teoriumantoj.

Nun venis tempo plifortigi la stabon per ĝuste administrita oficisto. Tio nepras nun pli ol malgrandigi la negativan saldon. Hokiĝi al librotenaj ciferoj estas regresi. Ni do ne pensu nur pri mono.

Osmo Buller

Kiel konate, ĉi-jare Unuiĝintaj Nacioj festas la 50-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (kies Esperantan tradukon UEA publikigis unuafoje en 1963). Artikolo 2 de la Deklaracio specifikas ke la homaj rajtoj “validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo”, inkluzive la diskriminacion laŭ lingvo. En sia statuto, Universala Esperanto-Asocio deklaras (jam ekde 1947) ke “la respekto de la homaj rajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo”. La koincidaj jubileoj de la Deklaracio kaj de UEA instigis UEA-aktivulojn aranĝi simpozion pri la temo “Lingvo kaj homaj rajtoj” en Palaco de Nacioj en Ĝenevo. La eventon antaŭis longa preparlaboro kun la Oficejo de la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj ĉe UN, kiu apogis la okazigon de la jubilea simpozio.

Kvardeko da interesitoj respondis al la invito de UEA veni en tiu aprila mardo al unu el la ĉefaj salonoj de Palaco de Nacioj por simpozio pri “Lingvo kaj homaj rajtoj: La rolo de ŝtatoj, de UN kaj de neregistaraj organizaĵoj”. Ĉar la temo rilatis unuavice al UN kaj neregistaraj organizaĵoj (NRO-j), la simpozio disvolviĝis grandparte en la angla lingvo, kun ĉeesto, flanke de la UN-instancoj, de Zdzisław Kędzia, supera konsilanto al la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj, kaj de Cecilia Thompson de la UN-oficejo pri Homaj Rajtoj (OHCHR). Alvenis reprezentantoj de la NRO-j Civitanoj de la Mondo, Federacio por Studo de Monda Estonteco, Federa Unuiĝo de Eŭropaj



Ĉe la 50-jariĝo de la Deklaracio

Nova pordo ĉe UN malfermita

Konkludoj kaj rekomendoj

de la Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj organizita de Universala Esperanto-Asocio sub aŭspicio de la Alta Komisiito de Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj, Ĝenevo, 28 aprilo 1998

1. Por kunlaboro pri lingvo kaj homaj rajtoj

Lingvaj rajtoj estas fundamenta parto de la homaj rajtoj. Protekto de lingvaj rajtoj necese baziĝas sur du ĝeneralaj principoj:

- la uzado kaj evoluigado de lingvoj kiel rimedoj de socia organizo kaj kultura esprimiĝo;
- la enradikigo de lingva egaleco kaj la forigo de lingvaj handikapo en la intergrupaj kaj interpersonaj rilatoj.

Konsciante pri la klopodoj de la UN-Komisiono pri Homaj Rajtoj (UNCHR) agnoski kaj certigi la unuan el tiuj principoj, kaj pri la kontribuoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) realigi la duan, la Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj rekomendas la starigon de long-perspektivaj kunlaboraj rilatoj inter la du organizaĵoj.

2. Kunlaboro sur la kampo de homaj rajtoj

Ekzistas granda malcerteco kaj malkonsento pri la etendiĝo de ekzistantaj lingvaj rajtoj, kaj pri la dezirindeco de ilia plua reguligado kaj disvastigado. La Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj rekomendas ke UNCHR kaj UEA kune serĉu vojojn kaj rimedojn por respondi al jenaj demandoj:

- Kiel nun interpretas lingvaj rajtoj la instancoj respondecaj pri ilia protekto kaj plenumo, kaj kiel oni povas instigi tiajn instancojn al pli alta nivelo de interpretado kaj plenumado?
- Kiuj tipoj de lingva handikapo aŭ lingva malegaleco jam necesigas aŭ pravigas la enkondukon de kontraŭdiskriminaciaj rimedoj sur la jura aŭ aliaj kampoj?



UEA festis sian 90-an datrevenon, la 28-an de aprilo, ankaŭ per simpozio pri “Lingvo kaj homaj rajtoj” en Palaco de Nacioj en Ĝenevo, kun subteno de la Oficejo de la Alta Komisiito pri Homaj Rajtoj ĉe UN.

Nacioj kaj SERVAS. La plej multaj partoprenantoj estis e-istoj diverslandaj (parte kun bona kono de la angla). Alvenis, krom la prelegantoj, i.a. d-ro Tazio Carlevaro, Renato Corsetti, Hans Erasmus, Povilas Jegorovas, Jorge Leoni de León, Marc Levin kaj Brian Moon.

Rekomendoj por kunlaboro

La simpozio komenciĝis post saluto de la Alta Komisiito, Mary Robinson, kiun laŭtleĝis Zdzisław Kędzia. Prezidis ĝin prof. Humphrey Tonkin, prezidanto de Universitato Hartford, kies enkonduka prelego traktis lingvajn kaj homajn rajtojn el historia perspektivo. Prof. LEE Chong-Yeong prelegis en Esperanto pri “Lingvaj rajtoj, la fundamento de homaj rajtoj”.

La aliaj prelegantoj estis prof. Christoph Pan, direktoro de Sudtirola Instituto pri Etnaj Grupoj en Bozen/Bolzano (Italio), d-ro Fernand de Varennes (Bozen), direktoro de Azia kaj Pacifika Centro por Homaj Rajtoj kaj Prevento de Etnaj Konfliktoj, Cecilia Thompson de OHCHR, Claude Piron kaj Mark Fettes. UEA planas eldoni broŝuron kun la tekstoj de la altnivelaj prelegoj de la seminario.

laracio de Homaj Rajtoj



Foto: Brian Moon

De maldekstre: prelegintoj d-ro Fernand de Varennes kaj Claude Piron; Nicole Piron.

En Palaco de Nacioj partoprenas la seminarion i.a (de maldekstre): Cecilia Thompson, Zdzisław Kędzia, Humphrey Tonkin, LEE Chong-Yeong kaj Joseph V. Komlossy.



Arkivo de UEA

Kvankam Svisio ne membras en Unuiĝintaj Nacioj, Palaco de Nacioj en Ĝenevo gastigas – post ligo de Nacioj – nuntempe diversajn oficejojn de UN.

El la simpoziaj laboroj rezultis rekomendaro pri kunlaboro kun UN-branĉoj kaj kun NRO-j por lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco (vd. ĉi-apude). OHCHR promesis favore konsideri registigon de UEA ĉe ĝi kiel neregistara organizaĵo. La sukcesa simpozio do malfermis al Esperanto kaj UEA novan pordon al Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo por konigi siajn ideojn pri lingvaj rajtoj kaj la bezonon de neŭtrala internacia lingvo por la bono de la homaj rajtoj de nacioj kun lingva malavantaĝo.

Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Esperanta traduko ricevebla de UEA kontraŭ 1 internacia respondukupon.

Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo. Ivo Lapenna. Rotterdam, 1952. 144p. Kun interesa ĉapitro pri "La fundamentaj homaj rajtoj kaj ilia jura protekto." 27,00 gld.

En la iama UEA-kvartalo

Lige kun la seminario okazis pliaj programeroj: la antaŭan vesperon la prezidanto de UEA renkontis dudekon da lokaj samideanoj. La simpozio tuj sekvis en la sam-palaca Kafejo de la Nacioj aperitivo je la kostoj de la urbo Ĝenevo.

La postan matenon Yvonne Cotton gvidis la samideanojn tra Ĝenevo kaj i.a. kondukis ilin al la domoj de la kvartalo kie iam sidejis UEA. Posttagmeze LEE Chong-Yeong veturis al La Chaux-de-Fonds: tie li estis akceptita de Claude Gacond en Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia kaj renkontis vespere lokajn e-istojn, unue en restoracio por komuna vespermanĝo, poste en KCE por libera interŝanĝo de opinioj.

La sukceso de la simpozio dankindas al organizinto Andy Künzli (UEA-representanto ĉe UN en Ĝenevo) kaj al kunlaborintoj A. kaj Y. Cotton, A. kaj C. Bickel, C. Gacond, B. Graf, N. Margot kaj F. Randin. ★

→ Respondoj al tiuj demandoj devus maksimume utiliĝi jam faritan laboron sur tiuj kampoj, kaj eble konduki al unufoja aŭ perioda raporto pri lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco en tutmonda skalo.

3. Kunlaboro kun aliaj branĉoj de UN

Lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco ne realiĝas nur per leĝoj kaj konvencioj, sed postulas agadon sur tiel diversaj kampoj de la laboro de UN kiel komunikado, edukado kaj kultura evoluigo. La Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj rekomendas ke UNCHR kaj UEA kunlaboru por instigi la branĉojn de UN al komuna uzado de siaj prilingvaj spertoj kaj rimedoj, interalie per jenaj paŝoj:

- organizado de interbranĉa konferenco pri lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco, cele al la starigo de laborgrupo aŭ alia forumo por interbranĉa kunlaboro pri lingvaj temoj;
- ellaboro de komuna programo aŭ centro sub aŭspicio de UN por la esplorado kaj dokumentado de lingvaj rajtoj, interlingvistiko kaj lingvopolitiko, kun aparta atento al la laborkampoj de la diversaj branĉoj de UN.

4. Kunlaboro kun neregistaraj organizaĵoj (NRO-j)

Lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco dependas ne nur de la decidoj de registaroj kaj interregistaraj organizaĵoj, sed ankaŭ de la sintenoj kaj kondutoj de individuoj kaj de civitanaj asocioj. La Datrevena Simpozio pri Lingvo kaj Homaj Rajtoj rekomendas ke UEA, kun la subteno de UNCHR, invitu elektitajn internaciajn NRO-jn kunfandi Koalicion por Lingvo kaj Homaj Rajtoj, kun jenaj taskoj:

- faciligi la interŝanĝon de informoj kaj spertoj pri temoj kiuj rilatas al lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco, pere de novaĵbulteno, renkontiĝoj kaj aliaj rimedoj;
- intime kunlabori kun UNCHR kaj aliaj branĉoj de UN por instigi al sistema konsiderado de lingvaj demandoj en internaciaj politikaj debatoj, kaj por faciligi la kontribuadon de popolaj organizaĵoj kaj de fakuloj pri lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco.



Anekdoto de Marvin Stanley
distras István Ertl kaj Birthe Lapenna
dum atendo de sekva plado.

Viena kafe-
bongustas
al Osmo
Buller,
Sonja van
Westrhenen,
Helena de
Geus kaj
Luiza Marin.



Diccon
Masterman
kaj Barbara
Despiney

Ed Borsboom fascinas per
aventuroj de
pioniro
Privat.



Janina Bańkowska sur-
bendigas direktorajn
vortojn.

Aranĝita la okan fojon la 25-an de aprilo, sabate, la Malferma Tago de la Centra Oficejo tamen ne riskis droni en rutino. La 90-a datreveno de UEA kreis okazon por “tagego”, kiu rezervis novan eventon — eĉ po du paralelajn — por ĉiu horo.

Historian etoson kreis la prelegoj de Mark Fettes pri Hector Hodler, de Ed Borsboom pri Edmond Privat kaj de Ulrich Lins pri Ivo Lapenna; dum ĉi lasta atentaj komentoj de Birthe Lapenna demonstris la vivecon de ĵusa pasinteco. Miko Sloper, de ELNA, prezentis la televidan kurson *Esperanto, pasporto al la tuta mondo* (vd. okt. '97, p. 171), kiun la usona landa asocio evoluigas kun aŭspicio de UEA. La argentina muzikisto Alejandro Cossavella gitare ĉarmis la publikon. Vico de la portretoj de ĉiuj 15 UEA-prezidintoj estis inaŭgurita en Salono Zamenhof; ĉeestis tri el la fotitoj, Grégoire Maertens, John Wells kaj LEE Chong-Yeong. Birthe Lapenna donacis al UEA grandan portreton de Ivo Lapenna, kiu trovis lokon en la ĉambro de la ĝenerala direktoro. Cetere, diversaj ĉambroj de la CO estis refarbitaj, retapiŝitaj kaj alie beligitaj por ĉi tiu tago.


120 vizitantoj el 16 landoj — i.a. Argentino, Belgio, Francio, Germanio, Japanio, Pollando kaj Usono — preskaŭ sukcesis eklogi la vizit-rekordon validan de 1995, kaj ilia nombro vaste superis la prin-

Jubilea suar- en etoso var-



Wiebren Akkerman kaj
Clay Magalhães liftas
super la plej granda
haveno de la mondo.

Argentinaj
sonoj per
Alejandro
Cossavella



Denove ne restas
liberaj lokoj en
prelegejo: unuavice
Piet Damman,
Frits Zeiler kaj
Elfriede Ernst.



Grégoire Maertens, Lee Chong-Yeong kaj Jean-Louis Texier en sia Roterdama hejmo, hotelo Van Walsum



Sur alta nivelo Roterdama panoramo fonas la toston de Louis Zaleski-Zamenhof kaj Lee Chong-Yeong.

tempe kutiman en la Malfermaj Tagoj. Sep gastoj eĉ restis pliajn du tagojn: la estraranoj de UEA (vd. p. 106), kiuj en sabato partoprenis akcepton por nunaj kaj iamaj estraranoj de UEA, en la hotelo Van Walsum, kiu jam de jardekoj gastigas ilin dum kunsidoj en Roterdamo. Kolektiĝis 19 estraranoj.


La Libroservo rabatis siajn varojn je 10%, kaj ĝi atingis rekordon per vendoj je 7041,18 gld. Plej dezirataj estis la freŝa UEA-eldonaĵo *Al lingva demokratio* (aktoj de la Nitobe-simpozio) kaj, plenan jaron post sia debuto, la ZEO-libro *Monumente pri Esperanto*.

Krom Esperantaj radio-elsendoj, ankaŭ la nederlanda tutmonda radio Wereldomroep registris intervjuon dum la tago, kies gastoj cetere trinkadis kafon donacitan de Radio Aŭstria Internacia.

Por kvardeko da homoj la festo ne finiĝis je la kvina horo: ĝi nur translokiĝis al la turo Euro-mast, en kies panorama restoracio je 100-metra alto oni bankedis aŭskultante tostojn de Louis Zaleski-Zamenhof kaj aliaj por la prospero de Esperanto kaj de la 100-jariĝonta UEA. ★

na
ma

Fotoj sen aŭtara indiko: François Vauthier



Miko Sloper, la pasportisto



D-ro Lins butikumas inter prelegoj.



Akademiestro Werner Bormann en oratora etoskreo



Gravas la unua impresio: Stanka Starčević bonvenigas gastojn.



Fettes pri Hodler en Biblioteko Hodler



Bankeda bonhumoro: Louis Zaleski-Zamenhof, Eliza Kehlet, John Wells

Du kongresurboj deciditaj

Lastan fojon kunsidante antaŭ sia mandat-fino, la Estraro difinis – preter rutinaj decidendaĵoj – la okazejojn de du venontaj Universalaj Kongresoj.

Post la Malferma Tago (vd. p. 104), ĉiujn sep festintajn estraranojn atendis du tagoj (26-27 apr.) da laboro en Salono Zamenhof de la Centra Oficejo. Ĉeestis krome la observantoj de TEJO (Jeroen Balkenende) kaj de ILEI (Atilio Orellana Rojas), kaj laŭbezone oficistoj de UEA.

Oni konstatis ke en la CO la laborfortoj plu malsufiĉas – kio kaŭzas handikapon precipe al la servoj en la Librotena Fako –, sed dungi novan oficiston, eĉ se partatempn, tro streĉus la kadrojn de la valida buĝeto, kvankam la eltenemon de la direktoroj oni verŝajne jam streĉis ĝis lasta limo. Ĉiuj servoj tamen kontentige funkcias, alvenas malmultaj plendoj. La Jarlibro estas sendota al la membroj en junio. Bonaj novaĵoj aŭdiĝis pri ĉi tiu revuo: ĉi-jare du aŭ tri numeroj de *Esperanto* povos havi verŝajne pli ol 20 paĝojn, kaj daŭros la strebo al ĝia grafika plibeligo. La ĉeesto de UEA en Interreto daŭre stagnas, sed direktoro Pasquale Zapelli kaj Kalle Kniivilä, komisiito pri informado, jam verkis laborplanon, kies plenumo devus plibonigi la situacion, se oni nur povus dediĉi laborforton al tio.

Rilate la membraron, la nuna politiko ebligi funkciadon de pluraj perantoj en unu lando donas konstateblajn rezultojn, ĉar en tiaj landoj la membraro kreskis. Ja nature, ĉar pli da perantoj signifas pli da personaj rilatoj favore influantaj la membriĝemon.



Paŭzante por revua pozo, de maldekstre dekstren staras la estraranoj Povilas Jegorovas, Fred de Geus, LEE Chong-Yeong, Amri Wandel kaj Mark Fettes; sidas Michela Lipari kaj Renée Triolle.

Amplifas tiun efikon konkurso inter perantoj, lanĉita en la pasinta oktobro.

Aŭstralio ne ronĝis la buĝeton

Oni ja antaŭvidis ke la Adelajda UK havos deficiton, sed ne ties kialon: ĝi fariĝis ĉ. 24 000 gld. ne pro manko de aliĝoj, sed pro malfavora kurz-evoluoj de la aŭstralia dolaro. La spezokonto de UEA tamen denove finiĝis per negativa saldo (19 500 gld.): malpli ol en 1996. Por 1999 la Estraro proponas al la Komitato plialtigon de la baza kotizo de 103 al 105 gld., por laŭi la nederlandan inflacion. Levigis la demando ĉu la enkonduko de eŭro, komuna mon-unuo en Eŭropa Unio, iel efikos sur la kotiz-sistemon de UEA. La komitata laborgrupo pri financoj devos pristudi la problemon ke apliko de sama eŭra kotizo al la tuta EU-landaro signifus por kelkaj landoj plialtigon.

Rilate al TEJO menciindas ke la du lastaj IJK (Güntersberge, 1996, kaj Asizo, 1997) estis tre malprofitaj. Ŝajnas ke nek la TEJO-estraro havas superrigardon pri la IJK-mastrumado – kiu restas komplete en la manoj de la lokaj organizantoj –, nek la Estraro de UEA ricevas la IJK-buĝetojn por aprobo, malrespekte al la koncerna regularo. Por la financa sekureco de TEJO tio estas tre maltrankviliga.

Kongresoj en Israelo kaj Kroatio

Fine venis respondo al demando de longe decidenda: ĉu la Universala Kongreso en la jaro 2000 okazu en Zagrebo aŭ en Tel-Avivo? Ĝenerala direktoro Osmo Buller, kiu persone sondis en ambaŭ landoj (vd. jun. '97, p. 104; jul.-aŭg. '97, p. 121), rekomendis Zagrebon, ĉar laŭ li la malcerteco pri la evoluo en Mez-Oriento prezentas tro grandan riskon por okazigo de UK tie. Post longa diskuto la Estraro tamen akceptis la inviton de la israela movado, precipe tial ĉar ĝi estis ripete formulita jam plurajn jarojn, sed ne estus reno-

vigita por la jaroj post 2000 – dum Zagrebo volonte kongresos ankaŭ en 2001. Fakte, en la sama diskuto naskiĝis la decido tuj honori la kroatan entuziasmon per UK-aprobo por 2001; tiel oni revenas al la praktiko difini kongres-urbojn tri jarojn pli frue. Por 2002 interesiĝas Brazilo, kaj por 2003 Gotenburgo (Svedio), sed aliaj kandidatoj eble ankoraŭ anonciĝos. Por la Berlina UK oni decidis pri la temo: “Tutmondiĝo: ŝancoj por paco?”.

István Ertl

KIUJ REPREZENTU VIN EN LA KOMITATO?

Elektu 8 el la 15 kandidatoj por komitatano B, kies nomojn vi trovos sur la balotilo ekspedita meze de majo al ĉiu individua membro de UEA kaj resendu tiun ĝis la 15-a de julio al la CO.

Aperis la unua numero de **Novaĵletero de Koalicio**

por **Internacia Helplingvo**, distribuita al internaciaj organizaĵoj kaj UN-misioj.



UEA en 1997



Festo en Zamenhof-tago en Goiânia (Brazilo). Brazila E-Ligo ricevis en 1997 jam duan fojon Trofeon Fyne pro sia multigo de individuaj UEA-membroj.

Foto kompleze de Kultura Esperanta Centro (Goiânia)

Kio okazis en Esperantujo tra la jaro 1997? La sekvaj paĝoj donos al vi respondon nepre ne elĉerpan, skizante nur esencajn erojn de la pasintjara eventaro, kun aparta atento al faktoj UEA-rilataj.

Ĝeneralaĵoj

Viglaj kontaktoj kaj diskutoj

Strukturo kaj konsisto

La nombro de aliĝintaj landaj asocioj atingis 59 per aliĝo de Armenia Esperanto-Asocio. Senŝanga restis la nombro de fakaj asocioj: 9 aliĝintaj kaj 37 kunlaborantaj.

La individuaj membroj (IM) nombris 7122 en 117 landoj; 162 malpli ol en 1996. Ili konsistis el 452 Membroj (M) kun Gvidlibro, 1337 M kun Jarlibro, 598 junaj M kun Jarlibro, 3504 M-Abonantoj, 277 junaj M-Abonantoj, 867 Dumvivaj M (DM), 17 junaj DM, 58 Honoraj M kaj 12 M de Honora Patrona Komitato. (Laŭlanda statistiko aperis en apr. '98, p. 79.) Malgraŭ la malkresko de IM la enspezoj de tiuj kategorioj (349 135 gld.) sumiĝis je 5966 gld. pli ol en

1996, dank' al la kresko de Membroj-Abonantoj kaj plifortiĝo de la valutoj de iuj landoj kun multaj membroj. La landaj asocioj anoncis 13 035 aligitajn membrojn (AM), 279 malpli ol en 1996. AM reduktiĝis precipe en Bulgario (-446), dum en aliaj landoj ilia sumo kreskis.

La Honora Patrona Komitato ricevis novan membron, John C. Wells (Britio). Kvar merituloj fariĝis Honoraj Membroj: Ivo Borovečki (Kroatio), Donald Broadribb (Aŭstralio), Jadwiga Gibczyńska (Pollando) kaj Liisi Oterma (Finnlando). Forpasis kvar Honoraj Membroj: Li Hajpin, Jaroslav Mařík, NGUYỄN HẢI TRUNG kaj Carl Støp-Bowitz.

La Jarlibro 1997 registris 42 ĉef-

delegitojn, 1051 delegitojn, 137 vic-delegitojn, 78 junularajn kaj 1416 fakajn delegitojn. La Delegita Reto konsistis entute el 1950 individuoj (120 pli ol en 1996) en 90 landoj.

Gvidorganoj

La Komitato konsistis el 57 A-, 8 B-kaj 13 C-komitatanoj kaj 8 observantoj. En la Adelajda sesio partoprenis 48 komitatanoj aŭ anstataŭantoj; minimume 40 en ĉiu kunsido. Menciindas la nekutima vigleco de la diskutoj kaj, malgraŭ la malgrandeco de la UK, sufiĉe multa ĉeesto de publiko (sep., p. 143-145). La Estraro kunsidis en Roterdamo dum du tagoj komence de aprilo (maj., p. 81) kaj kvarfoje en Adelajdo. La kunsidon en CO ĉeestis ĉiuj sep estraranoj; tiujn dum UK partoprenis kvin. Interkunside la estraranoj vigle kontaktadis, precipe retpoŝte. Aperis 4 n-roj de la interna informilo-diskutilo *Letero de UEA-Estraranoj*, kun sume 40 paĝoj. ■

Servoj sub laborpremo

Personaro


Ne estis ŝanĝoj en la oficistaro. Laboris 11 oficistoj, el kiuj 2 partatempe, tiel ke la entuta laborforto egalas al 10 plentempaj dungitoj. La malekvilibro inter la laborforto kaj la plenumendaj taskoj fariĝis ĉiam pli prema, kaŭzante multe da nepagita kromlaboro kaj rezignon pri laŭleĝaj ferioj. Tra la tuta jaro deĵoris sinsekve du volontuloj por TEJO, kiuj parte helpis ankaŭ pri UEA-laboroj. En decembro afrika volontulo komencis dumonatan deĵoron pri la afrika agado. Lokaj volontuloj regule helpis en la librotena kaj kongresa fakoj, biblioteko kaj dompri-zorgo.

Ekpaĵoj

Donacoj al Fondaĵo Officeja Ilaro ebligis aĉeti personan komputilon. Cetere okazis nur rutinaj aĉetoj.

Servoj

Jarlibro 1997, 296-paĝa, aperis en junio. La 11 numeroj de la revuo *Esperanto* atingis la membrojn averaĝe en la unua duono de la monato. Por multaj ekstereŭropaj landoj tio signifis



Malmultaj klientoj rezistis al *Monumente pri Esperanto*.

Foto: François Veuthey

plifruigon kompare kun 1996. Kontribuis al tio la ekuzo de nova kompanio por ekspedo de *Esperanto*, *Kontakto* kaj *Jarlibro*. Krome, tiu kompanio enkovertigas la sendaĵojn sen aldona pago. Antaŭe tiu laboro postulis duonan labortagon de pluraj oficistoj ĉiunmonate.

La Libroservo enspezis malnete 260 377 gld., t.e. 16 419 gld. malpli ol en 1996. La malkresko estis antaŭvidebla en jaro kun malgranda UK: en Adelajdo la vendoj sumiĝis je 31 026

gld., preskaŭ 51 000 gld. malpli ol en Prago. La jarfina diferenco tamen ne estis tiom granda pro sukceso de novaj eldonaĵoj de UEA, oferto-kampanjoj kaj rekordaj vendoj dum la Malfermaj Tagoj de la CO aprile kaj novembre. La neta profito de la Libroservo estis 78 839 gld. (90 935 en 1996). Tiun malkreskon grandparte kompensis pli alta gajno de la Eldona Fakoj (+7530 gld.). La abon servo gajnis nete 4480 gld. perante 449 gazet-abonojn.

En aprilo aperis *Monumente pri Esperanto* de H. Röllinger, informlibro pri 1044 objektoj rilataj al Zamenhof aŭ E-o. Ĝi pintis en la vendostatiko: 644 ekz. venditaj en 1997. En novembro eliris la prozaĵaro *Pajleroj kaj stoploj* de W. Auld kaj *Kulturo kaj teknologio*, traduko de eldonaĵo de Unesko kadre de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo.

Kampanjo 2000

Ambicia lanĉo

En Adelajdo la Komitato lanĉis "Kampanjon 2000 por nova internacia lingva ordo" kaj aprobis ĝiajn ĝeneralan planon kaj laborplanon. Por kunordigi ĝin oni elektis trikapan komisionon (LEE Chong-Yeong, Renato Corsetti, Osmo Buller). La Kampanjo celas levi la organizan kaj idean nivelon de la E-komunumo, levi la prestiĝon de la internacia lingvo kaj influi la internacian vivon.

La unuaj fruktoj aperis jam en 1997, ĉar pluraj fakaj kaj landaj asocioj starigis proprajn laborplanojn kaj ekplenumis ilin, eĉ se ne ĉiuj reagis tiel rapide kiel dezirite. Por UEA mem temis pasintjare ĉefe pri



preparado de kampanjeroj planitaj por realigo en 1998 aŭ poste. Menciindas invito sendita al fakaj asocioj kaj aliaj E-instancoj por partopreno en la Strategia Forumo de la E-Komunumo lige kun la Montpeliera UK. Cirkulero al landaj asocioj por instigi ilin ekrilati kun la Unesko-komisiono de sia lando ricevis bonan reagon. Alvoko pri donacoj por agadoj kiuj ne estas kovreblaj el la buĝeto de UEA, alportis ĝis la jaro fino 31 750 gld.

Manifesto de Prago, kies lanĉo en Prago fakte kreis la atmosferon por Kampanjo 2000, nombris jarfine pli ol 10 000 subskribintojn.

Tiu ĉi revuo publikigis ĉiunumere ideajn artikolojn ĉirkaŭ la Kampanjo kaj novaĵojn pri ĝia realigado tra la mondo. Aparte notindas la aprila artikolo (p. 62-64) de Lee kaj Corsetti, poste akceptita kiel la ĝenerala plano de Kampanjo 2000.

Financo

Estrarano: de Geus

Forteco super a

Oni eniris la jaron ne sen timo pri la disvolviĝo de la spezoj. Ĉar Unversalaj Kongresoj grave influas la enspezojn, dum la elspezoj estas relative stabilaj, en jaro de malpli ol averaĝe granda UK ne estis memklare ke realigos la buĝetita redukto de la negativa saldo de la spezokonto. Efektive, la Adelajda UK liveris al la spezokonto licencpagon de 82 373 gld., kiu estis

Sukceso preter horzonoj

La 82-a Universala Kongreso okazis de la 19-a ĝis la 26-a de julio en Adelajdo (Aŭstralio), kun 1224 aliĝintoj el 54 landoj.

La kongreson salutis Kofi Annan, Ĝenerala Sekretario de UN, kaj — en la nomo de Federico Mayor, Ĝenerala Direktoro de Unesko — Dennis Cunningham, aŭstralia kunordiganto de la projekto Linguapax.

La kongresa temo “Toleremo kaj justeco en multkultura socio” estis traktita en du unuhoraj kunvenoj, sed krome multaj el la kongresaj programeroj iel referencis al la mozaïke multkultura realo de la gastiganta kontinento: ekde la “solene inaŭguraj” sonoj de la blov-instrumento diĝeriduo, tra vizito al aborigena kolegio, ĝis la prelegoj pri la aŭstraliaj lingvoj kaj kulturoj. La vortumo de tem-rilata kongresa rezolucio kunligis, unuflanke, la bezonon komuniki facile kaj egalece en multkultura socio kaj, aliflanke, la pruvitan utilon de Esperanto fronte al tia defio.

Sep prelegoj de Internacia Kongresa Universitato kovris spektron de temoj artaj, lingvistikaj kaj soci-sciencaj. Unuafoje de post la fondiĝo de Senacieca Asocio Tutmonda okazis fak-kunsido de SAT-membroj kadre de UK. Nemalmultaj fakaj asocioj sukcesis aranĝi kunvenon, eĉ se foje nur por manpleno da interesatoj.

Kvankam eksterkongresaj, menciindas la prelegoj, ĉe Universitato de Adelajdo, de prof. David Crystal pri la angla kiel tutmonda lingvo kaj,

kontraste, de prof. J. Wells pri Esperanto, vivpova lingvo internacia. Kreiĝis fruktodonaj kontaktoj kun lingvistoj Adelajdaj, kiel Peter Mühlhäusler kaj Rob Amery, kiuj partoprenis kongreserojn rilatajn al ilia fako.

La urbo Adelajdo atenteme ornamis sian ĉefan avenuon per verdaj flagoj kun la slogano “Esperanto, paco, amikeco”. La kongreso vekis konsiderin-

dan atenton ne nur ĉe lokaj ĵurnaloj: vizitis ĝin ankaŭ korespondantoj de tutlandaj gazetoj, de diversaj televidaj kaj radiaj stacioj. Tra la kongresejo daŭre videblis skipo de filmistoj, ĉase al sekvencoj por tuthora filmo pri aŭstraliaj E-veteranoj.

La LKK, kunvarbita el distancoj nur aviadile venkeblaj, kunlaboris afable kaj efike. Aperis kvin numeroj de la kongresa kuriero *La lumilo*, kaj por komputilantoj — unuan fojon en la historio de la Universalaj Kongresoj — hejmpaĝo igis la kongreson iusence partoprenebla eldistance.



Revuoj

Vasta temaro

Esperanto

Kiel ĝis 1995, pasintjare la legantaro denove superis la kvinan milon: precize 5003 pagintaj ricevantoj povis legi 11 fojojn la revuon de UEA, kiu tiel plifirmigis sian pozicion de la plej legata E-revuo.

La plej konstanta temfadenado tra la jaro estis Kampanjo 2000 (vd. p. 108), sed ampleksaj artikoloj traktis ankaŭ facetojn i.a. de niaj eksteraj rilatoj, de interlingvistiko, komputiko, bibliotekoj, teatro kaj literaturo. Al la centjara jubileo de S. Szathmári omaĝis premiera aperigo de traduko el lia romano “Vane”. 44 Esperantaj verkoj estis recenzitaj sur

16 paĝoj, dum “Laste aperis” prezentis 285 titolojn. Ne mankis debatoj, precipe en la rubrikoj “Forumo” (6 paĝoj) kaj “Reagoj” (5 p.), krome en la suplemento *Influo* (vd. “Informado”, p. 111).

Kontakto

Per 2050 pagitaj abonoj (2009 en 1996) la soci-kultura revuo de TEJO atingis rekordon en la lasta, sesa

jaro de redaktoro F.L. Veuthey. Tiu nombro konsistis el 892 junaj membroj, 113 Patronoj aŭ Dumvivaj Patronoj de TEJO, kaj 443 simplaj kaj 602 kolektivaj abonoj.

Apud kontribuaĵoj el ĉiu kontinento pri vasta gamo da temoj, *Kontakto* plu publikigis artikolojn el Unesko-eldonaĵoj, kion la revuo *Unesco Sources* rekonis aperigante en novembro tiuteman leteron de Veuthey.



tendo

duono de tiu de la Praga UK kaj eĉ malpli ol buĝetite (100 000 gld.). Turismaj servoj, ĉefe vendo de flugoj lige kun la UK, enspezigis 24 102 gld. Tio estis apenaŭ duono de la buĝeta celo (50 000), ĉar post la fikso de la guldenaj prezoj de la flugoj, la kurzo de la aŭstralia dolaro — kaj de iuj aliaj valutoj en kiuj UEA devis pagi la biletojn — surprize kaj forte plialtiĝis,

grandparte forviŝante la antaŭkalkulitan gajnon. Fava evoluo de aliaj buĝeteroj tamen ebligis ke la UK-rilatajn perdojn necesis nur parte (t.e. 24 500 gld.) kompensi el la rezervo de 47 000 gld., apartigita en 1996 el la kotizprocentaĵo de la Praga UK. Reliefigas tiurilate ke, kompare kun la buĝeto, oni ŝparis 16 000 gld. ĉe oficistaro, 12 500 gld. ĉe oficejaj kostoj kaj 8 400 gld. ĉe la Jarlibro. Tiuj kaj aliaj ŝparoj atestas pri alta grado de kost-efikeco, kiun la CO atingis per plurjara konscia strebado, sen redukti — eĉ male — la servojn kaj aliajn agadojn.

Ankaŭ la bilanco reflektas daŭran solidiĝon de la financa bazo de UEA, eĉ se la ŝvelo de la havaĵoj grandparte devenis de plua kresko de la valor-paperaj borsokurzoj. El la financa forto de UEA profitas la tuta movado. En 1997 subvencioj (precipe el la fondaĵoj) kaj premioj al organizaĵoj kaj unopuloj sumis ĉ. 160 000 gld. Plian profiton al la tuta movado donas la ĉiam pli grava rolo de la UEA-kontosistemo, kiu simpligas ĝian mon-cirkuladon kaj ŝparas kostojn. Ankaŭ tiel UEA estas la efektiva centro de la movado — ankaŭ por tiuj kiuj en teorio ne agnoskas tion.

Senfanfarona solidaro

Afriko

En sia 17-a ekzistojaro la afrika movado, plu juna kaj vigla, volas memstariĝi. Afriko mem suferas pli kaj pli, sed la esperantistoj restas energiaj. Kelkaj kluboj kaj asocioj trovis manierojn por enspezi, dum plej multaj plu dependas de UEA, IEL, SAT-Amikaro k.a. asocioj, kluboj kaj unuopuloj, kiuj senfanfarone solidaras. UEA devas pensi pri sia estonta rolo ĉi-kampe. La komisiito H. Bakker ne malkaŝis ke li elĉerpigas: ekz. la korespondado paneis du-tri fojojn. La necesa reorganizo devas sekvi du trakojn. Unue, riĉaj landoj pli kaj pli anstataŭu UEA kaj ĝian komisiiton en la rilatado kun kluboj kaj asocioj. Tradicie tio jam okazas; ekz. Helga Farukuoye (Aŭstrio) de 15 jaroj flegadas la rilatojn kun Niĝerio. Tia kunlaboro devas kreski. Due, Afriko mem transprenu la prizorgon de sia movado. Sen financa helpo de UEA tio tamen ne eblas. Feliĉe, donacantoj al Fondaĵo Afriko estas fidelaj kaj malavaraj. Decembre Raoul Hounnake el la togolanda LA ekstaĝis en la CO por studi la eblon transigi Togolanden parton de laboro de Bakker. Tieaj movadanoj estas kapablaj kaj bonvolaj, sed nigraj nuboj ombras la enlandan politikon (marto '98, p. 42-43).

Ameriko

La Komisiono pri Amerika Agado aktivis i.a. per du kunvenoj, publika kaj nepublika, en Adelajdo. Ĝia TTT-paĝo (<http://www.digicron.com/ameriko/>), prizorgata de J. Rezende Piton (Brazilo), estis multe vizitata. La vigleco kaj iniciatemo de la movado en Ameriko estis rekonita de UEA i.a. per premioj kaj subvencioj. Brazilo E-Ligo ricevis jam la duan fojon la Trofeon Fyne pro la plej granda kresko de UEA-membraro. Fondaĵo Saliko subvenciis (20 000 gld.) la vidbendan kurson *Esperanto, pasporto al la tuta mondo*, preparatan de ELNA (Usono) aŭspicie de UEA. El la 15 lecionoj pretiĝis jam kvar. Subvencion Cigno (8 757,50 gld.) ricevis Kuba E-Asocio por modernigi sian oficejan ilaron kaj tiun de la E-redakcio de Radio Havano. Brazilo E-Ligo pligrandigis sian

sidejon, dank' al malavara donaco. La servoj de BEL al la membroj estas daŭre plibonigataj. Ĝia libroservo fariĝis la plej granda en la kontinento kaj unu el la plej grandaj inter la klientoj de UEA. Estis imitindaj ekzemploj de solidareco inter amerikaj asocioj. Meksika E-Federacio invitis vojaĝantan preleganton el Kubo, donacis lernilojn al Nikaragvo kaj mem ricevis legolibrojn de Brazilo E-Ligo. Argentino E-Ligo donacis lernilojn al Nikaragvo, same kiel usonaj e-istoj, kiuj krome sendis ilin al Salvadoro kaj subtenis partoprenon de argentina nino en la San-Franciska somera kursaro. Ankaŭ Fondaĵo Ameriko helpis, i.a. donacante Mazi-kurskompleton al Argentino. Bill Maxey (Usono) instruvojaĝis kelkajn monatojn en Centra Ameriko. Ĝemeliĝis kluboj de Campinas (Brazilo) kun Glasgovo (Britio), Sancti Spiritus (Kubo) kun Antverpeno (Belgio), kaj Santiago de Cuba (Kubo) kun Triesto (Italio). La Komisiono vartis kontaktojn kun landoj sen organizita movado, i.a. Salvadoro, kie la freŝa aktivulo Roberto Alvarenga ekplanis E-kurson en universitato.

Azio

Universitata E-klubo fondiĝis en la taĝika ĉefurbo Duŝanbe. En Irano, kie amaskomunikiloj daŭre donas multan spacon al Esperanto, ekfunkciis korespondanta E-kurso. Irana E-Centro akiris novan sidejon, same kiel Korea E-Asocio. La ekleziestro de ŝonbulismo, kore-devena religio, esprimis sin favore pri Esperanto kaj ties gazeto am-

Antaŭ "la Reveno": dudeko da lernantoj semajnfino kun Honkonga E-Asocio en insulo Ĉeung.



Foto: Komitato de Bill Mox

Daŭra elano

La nova elano pri eksteraj rilatoj, kiu karakterizis la Asocion en 1996, daŭris kaj plifirmigis tra la sekva jaro. Plej grave, la rilatoj kun Unesko stabiligis sur nova nivelo, kun la asigno de "operaciaj rilatoj" al UEA (sep., p. 146) kaj ILEI (dec., p. 205)

kaj kun la kresko de kunlaboro plurflanka. Interalie, UEA ekplanis kontribuon al la Unesko-projekto Lingua-pax; gastigis la prezidanton de ties internacia komitato, Dennis Cunningham, ĉe la Adelajda UK; eldonis tradukon de la Unesko-libreto *Kulturo kaj teknologio*; kunlaboris kun la Novjorka oficejo de Unesko por organizi konferencon pri lingvaj rajtoj, kaj elektiĝis en la Konsilion de Neregistaraj Organizaĵoj ĉe Unesko. Ne malpli ol kvar estraranoj (Lee kaj Fettes, Triolle pri edukado, kaj Wandel

D-rino Purificación Quisumbing, ĉefo de la Novjorka Oficejo de la Centro por Homaj Rajtoj (meze), kun UEA-prezidanto Lee (dekstre).



Foto komplezo de Lee Chong-Young

ĉefo, Purificación Quisumbing, prelegis en la maja CED-konferenco pri “Lingvaj rajtoj kaj respondecoj” (jun., p. 101); sekve, UEA lanĉis la organizadon de similtema simpozio en Ĝenevo en 1998. Komisiitoj Rochelle Grossman (Novjorko), Andy Künzli (Ĝenevo) kaj Walter Klag (Vieno), solaj aŭ kun aliaj, reprezentis UEA en aranĝoj kaj konsultigoj tra la jaro.

UEA unuafoje delegis reprezentanton ĉe FAO (Nutraĵa kaj Agrikultura Organizaĵo de UN), Lilia Fabretto. Kiel nova komisiito ĉe UNICEF ekfunkciis Mario Bélisle.

Komisiito Hans Erasmus sisteme pludisvolvis la strategion de UEA ĉe Eŭropa Parlamento kaj Konsilio de Eŭropo. Ĉe la unua, temas pri streboj gajni subtenon de unu (aŭ pli) el la pli grandaj politikaj grupigoj por oficiala esploro pri la eduka potencialo de Esperanto, la t.n. projekto NEIGHBOUR; malgraŭ multaj pozitivaj kontaktoj, tia subteno ankoraŭ ne realiĝis. Ĉe la dua okazis klara progreso pasintjare: UEA gajnis agnoskon por NEIGHBOUR kadre de programo por plibonigi internaciajn rilatojn ĉe Mediteraneo (apr. ‘98, p. 69). Krome, UEA fariĝis membro de la nova Eŭropa Konsilio por Lingvoj (okt., p. 165).

pri scienco) estis enplektitaj en tiun agadon, kune kun komisiito Barbara Despiney kaj pluraj aliaj helpantoj.

Ankaŭ ĉe UN la jaro estis rimarkinda, unuavice pro la fondo de Koalicio por Internacia Helplingvo en Novjorko laŭ iniciato de UEA kaj Transnacia Radikala Partio (jun., p. 101). La fondomembroj de la Koalicio inkluzivas organizaĵojn de bahaanoj kaj mondfederistoj, kaj la interreligian Templon de Interkompreno. Kreiĝis bonaj rilatoj kun la UN-Komisiono por Homaj Rajtoj, kies Novjorka

aranĝon en Honkongo kun 24 partoprenantoj (okt., p. 172). Ses honkonganoj estis inter la 102 partoprenantoj de Tutlanda Konferenco de Esperanta Kulturo decembre en Conghua, Kantono (apr. ‘98, p. 65). Tutnaciaj televid-elsendoj elvokis multajn informpetojn en Hinda Unio. Modele aktivis Komisiono pri Azia E-Movado. Ĝian kunordigan-informan funkcion ĉefe plenumis la bulteno *Esperanto en Azio*, de kiu aperis tri numeroj kompetente redaktitaj de ges-roj Doi. Denove laŭdinda estis la solidareco de japanaj esperantistoj, kiuj en 1997 kolektis ĉ. 8000 gld. por Fondaĵo Azio.


Eŭropo

Tria Eŭrop-Unia E-Kongreso maje en Stutgarto (Germanio) altiris 400 kongresanojn el 22 landoj (jul.-aŭg., p. 124). Du germanaj eŭro-parlamentanoj kundiskutis pri la kongrestemo “Eŭropo: kien vi?”. Eŭropa E-Unio akceptis novan statuton, sed daŭre lamis ĝia efektiva aktivigo. Ĝenerale

LA-j zorgas pri informado per funkciigo de rebatservo aŭ (ekz. Francio kaj Norvegio) nacilingva gazeto. Reklamado okazis ankaŭ per poŝta stampo en Danio kaj Ĉeĥio. En kelkaj landoj oni multe investis por reklami E-on ĉe lingvofoiroj. Tiel okazis en Francio (Parizo kaj Tuluzo), Luksemburgio kaj Finnlando (Jyväskylä). Ĉiam pli uzata estas Interreto; la TTT-paĝo de Sveda E-Federacio altiris ĉiutage eĉ 500-1000 vizitojn. Norvega E-Ligo iniciatis novan estraran labormetodon. Hispana E-Federacio festis 50-jariĝon per kongreso kun reĝino Sofia kiel honora prezidanto (okt., p. 169). Esperanto-Nederland mendis de enketfirmao esploron pri la publika kono de Esperanto; konfirmiĝis la ĝenerala nescio, sed ankaŭ neantaŭjuĝemo de junularo, se nur ĝi estus sufiĉe informita (majo, p. 88). En eks-socialismaj landoj plifortiĝis signoj de revigliĝo. Pola E-Asocio elektis novan ĉefestraron kaj translokiis sian sidejon de Varsovio al la sudpola Gliwice,

Informado

Du minutoj da CNN



Dum agemaj informistoj laŭkute sin mobilizis en dekoj da landoj por la pasintjara Ago-Tago, en ĉi tiu revuo grandan diskuton katalizis kritiko de B. Golden al Ago-Tago 1996 en Turku (Finnlando) kaj aliloke: en *Influo* — aperinta tri fojojn po kvar paĝoj — li kvalifikis ĉi tiujn kiel “propagandajn mispaŝojn surstrate” (jul.-aŭg., p. 131). Sekvis rebatoj kaj pardonpeto de la redakcio.

Kernaj temoj por interesi amaskomunikilojn estis la UK (sep., p. 151), la Praga Manifesto tradukita en la italan, persan kaj aliajn lingvojn (jun., p. 103), sed ankaŭ naciaj kongresoj, kiel tiuj de la baldaŭaj UK-landoj Israelo (sep., p. 159) kaj Kroatio (okt., p. 178). La 15-an de decembro (!) la tutmonda televido CNN dediĉis 2 minutojn al Esperanto, lige al la lingvaj problemoj kiujn Eŭropo alfrontas, kaj, jam en 1998, ĝi elsendis duonhoran programon samteman (majo ‘98, p. 97).

kreante bazon por restarigo de serioza funkciado, pri kiu la Komitato de UEA apelaciis en Adelajdo. Pozitiva estis la evoluo en Kroatio, kie progresis la movada unuecigo kadre de Kroata E-Ligo. Ankaŭ la organiza haoso de Bulgara E-Asocio ŝajne eksolviĝis per elekto de nova gvidantaro. Post trijara sen-asocieco en la lando, fondiĝis Slovaka Esperanta Federacio, ankoraŭ ne aliĝinta al UEA (jul.-aŭg., p. 127). Rusia E-ista Unio plu palpserĉis vojon al efektiva LA-eco, tamen sen videbla sukceso.

Oceanio

En la 82-a UK en Adelajdo kulminis agado kiu longe superregis la taskaron de aŭstraliaj e-istoj. Pli ol 200 da ili partoprenis en la UK, kiu tiel fariĝis rekorda kuniĝo de la movado en tiu lando de distancoj. Ĝojigis la granda atento fare de amaskomunikiloj. Ĉirkaŭ la UK multaj kongresanoj vizitis Nov-Zelandon, renkontante kompreneble tieajn movadanojn.

Valorojn gardi kaj krei

Sekvas nur malkompleta prezento de iuj eroj el la vasta kampo de Esperanta kulturo: temas grandparte pri atingoj kaj eventoj iel rilataj al UEA.

Bibliotekoj, muzeoj

Geedzoj Thorsen kreis per donaco de ĉ. 35 000 gld. Bibliotekan Apogon, kiu dum almenaŭ dek jaroj helpas al E-bibliotekoj riĉiĝi per aĉetoj ĉe la Libroservo de UEA. Por la unua fojo alvenis 21 subvenci-petoj: la estrarano pri kulturo kaj la ĝenerala direktoro aljuĝis po 200-600 gld., entute 3500 gld., al la 9 plej apogindaj kandidatoj.

La Nacia E-Muzeo en Gray (Francio) festis sian 20-jariĝon (sep., p. 157).

UEA nomumis Sabine kaj Christian Darbellay kiel komisiitojn por kunordigo pri la konservado de Esperantaj kulturaĵoj.

Premioj, eventoj

Belartaj Konkursoj de UEA en 1997 alportis mapli da konkursaĵoj ol kutime. En Adelajdo 3 el la 7 BK-branĉoj restis sen unua premio, kaj premiojn meritis entute nur 12 konkursaĵoj el 76.

Fondaĵo Grabowski donis premion al la verkistoj Trevor Steele, GBEGLO Koffi kaj Mao Zifu, kaj al la revuo *Litova Stelo*. Anoj de OSIEK premiis la tradukon, fare de F. de Diego, de *Cent jaroj da soleco* de G. García Márquez.

En Danio oni proponis senpagan kurson por senlaboruloj; en Belgio kurson ĉe kristanaj sindikatoj. Populariĝas dutagaj intensaj kursoj (ekz. Francio, Danio, Irlando, Togolando). En Madagaskaro, apud tre vizitataj konversaciaj rondoj, ekfunkciis koresponda kurso. En Hispanio startis tia kurso kun samtempa aliĝo al la landa asocio. En Svedio malfermiĝis kursejo-feriejo en Lesjöfors. Kelklunde E-instruantoj ricevis okazon por plia kvalifikiĝo: ekz. en Nederlando per studotago ĉe Internacia E-Instituto, en Svislando per metodika tago en Berno, en Italio per Cseh-seminario en Triesto.

La Komisiono pri Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA renoviĝis, kun Atilio Orellana Rojas kiel prezidanto kaj Hans ten Hagen kiel sekretario. Okazis 9 sesioj en 8 landoj kun 47 kandidatoj el 12 landoj. Sukcesis 17 el 32 kandidatoj de la elementa nivelo kaj ĉiuj 15 de la meza nivelo.

Koresponda Servo Mondskala de UEA, akurate prizorgata de F.X. Gilbert, ricevis 550 petojn (1996: 579), tiel retenante la nivelon klare super tiu antaŭ 1996. ■

Eldonado

Pri la eldona agado de UEA vd. "Administrado" (p. 108).

1997 alportis la plej riĉan romanrikolton post tuta jardeko: *Tien de Valano*, *La vidvino kaj la profesoro* de Gates, *Falĉita kiel fojno* kaj *Mistero ĉe Nigra Lago* de Johansson, *La manto* de pseŭdonima P. Mährti kaj la ampleksan, postmortan *Ordeno de verkistoj* de Piĉ.

Kompletiĝis la eldono de du trilogioj, probable la du plej ampleksaj beletraj tradukoj Esperanten: la klasika ĉina romano *Ruĝdoma sonĝo* (trad. XIE Yuming, 1893 p.) kaj *La mastro de l' ringoj* de Tolkien (William Auld, 1371 p.). El Fonto ŝprucis ok tradukoj brazilaj, dum Libroteko Tokio enmondigis novan tradukon (Nora Bartels) de *Taglibro de Anne Frank*.

Per novaj vortaroj riĉiĝis la uzantoj de la lingvoj albana, ĉeĥa, kataluna, persa kaj portugala. ■

Instruado, edukado

Estrarano: Triolle

Por packulturo

Subvencio al la vidbenda kurso de ELNA kaj atribuo de Premio Deguĉi al la Greziljona kulturcentro: jen ekzemploj pri la atento de UEA al instruado kaj edukado.

UEA aktivis ankaŭ ekstermovade, precipe ĉe Unesko, kies kolokvojn kaj kunsidojn ĝi ofte partoprenas. En Adelajdo UEA lanĉis planon de dujara programo pri la valoro de E-o por packultura edukado kaj lingvolerna propedeŭtiko.

Ĉe la universitato de Amsterdamo establiĝis katedro pri interlingvistiko.

Faka agado, scienco

Estrarano: Wandel

Sur bonaj reloj

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) subskribis kontrakton kun UEA pri komunaj universitataj sesioj (AISIKU) dum UK-oj (nov., p.186).

Wandel plu flegis la kontaktojn kun NRO-j kaj ĉe Unesko (majo, p.84). Aparte fruktodona estis kontakto kun Internacia Asocio de Universitatoj, kiu proponis al AIS aliĝon kiel asocia membro.



Fervoja terminaro de IFEF

Esperanto-kurso de vjetnamaj intelektuloj en januaro 1997.



Foto komplezo de HANESE

Lingvo, esploro kaj doku

Nova direkto in

La strategia signifo de Centro de Esploro kaj Dokumentado relieĝis en 1997, kiam ĝia 15-a Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado ŝlosile kontribuis al la kreskanta agado ĉe UN en Novjorko (jun., p. 101). La temo de la konferenco, "Lingvaj rajtoj kaj respondecoj", eventuale eĉ montras novan direkton por la interlingvistiko,

TEJO aŭdigis sian voĉon

Ĉefe dank' al la granda IJK, TEJO kreskis en 1997, havante 892 individuajn kaj 2512 aligitajn membrojn (en 1996 resp. 843 kaj 2449). Unu el ses UEA-anoj (IM+AM), nome 16,9% membris en TEJO (16,0% en 1996). Krome TEJO ĝuis la apogon de 101 Patronoj (108 en 1996) kaj 12 Dumvivaj Patronoj (11).

La 53-a IJK en Asizo, Italio (24-31 julio), sub la temo "La homo: ĉu super aŭ parto de la naturo?", arigis ĉ. 500 aliĝintojn el 30 landoj. LKK sukcesis kunigi je ĉies kontento ekstreme abundan kulturen programon kun multa traktado de la kongrestemo kaj kun aliaj laborkunsidoj (sep., p. 156). La enspezoj tamen ne kovris la kostojn kaj rezultis defcito de ĉ. 13 000 gld.

Escepte de IJK, la spezoj de TEJO estis pli-malpli ekvilibraj. Tio sekvis ĉefe el la ŝparoj pro la translokiĝo de la Eŭropa Oficejo el Bonn al Roterdamo, decidita de la Komitato en Assisi. La plej grava decido de la Komitato estis la elekto de nova 8-kapa estraro, kun prezidanto Joseph Truong (Usono). Ĝi ricevis i.a.

Ne nepris vojaĝi al fora IJK: ankaŭ Adelajdo donis amuzon!

Foto: Kim S. Lee

En ĉi tiu revuo ofta temo estis fakaj asocioj kaj scienco, ekz. en artikoloj pri la agado fervojista, bahaana kaj blindula.

Fervojistoj kongresis en Slovakio (197 homoj, Košice, sep., p. 158). La blindula organizaĵo LIBE kunaranĝis internacian seminarion pri brajlo, kun E-o kiel unu el la laborlingvoj (jul., p. 127), kaj en sia kongreso intense rilatis kun vidhandikapitoj en Ukrainio (okt., p. 170). Anojn de la 50-a IKUE-kongreso en Romo (nov., p. 187) la papo salutis en E-o dum ĝenerala aŭdienco.

OSIEK-konferenco esploris en Rafina (Grekio) helenajn influojn en la mond-

kulturo; post longa tempo E-o reaperis ĉe SERVAS (ambaŭ: nov., p. 188).

Premio Pirlot iris en 1997 al Carlo Minnaja por lia vortaro de pli ol mil paĝoj, *Vocabolario italiano-Esperanto*.

La evento de la jaro estis sendube la apero de ampleksa *Fervoja terminaro* en 13 lingvoj. Eldoniĝis ankaŭ *Fotografia fakvortaro*. Menciindas la diversfakaj monografioj *ABC de la Eŭropa Unio* (R. Urueña), *Eŭro* (M. Vanden Bempt), *Ĉu via bebo aŭdas?* (A. Kankkunen), *Sukerfarado* (C. Longue-Épée), *Sur la spuroj de Lorca* (M. Fernández) kaj lernilo de la bretona lingvo. En Adelajdo eblis aĉeti broŝuron kun IKU-prelegoj, kies tuta kvanto elĉerpiĝis.

Detlev Blanke, Tonkin ankaŭ daŭrigis sian bibliografian kunlaboron kun la usona Asocio de Modernaj Lingvoj, registrinte jam pli ol 5000 erojn pri esperantologio kaj interlingvistiko (jan., p. 10-11). Bone fartis en 1997 aliaj konstantaj agadoj de CED, kiel la fakrevuoj *Informilo por Interlingvistoj* kaj *Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado*; tamen pro troa laborŝarĝo la eŭropa ĉefredaktoro de LPLP, Klaus Schubert, anoncis sian demision. Lia posteulo estas Marc van Oostendorp, nova profesoro pri interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo. ■

la taskon esplori ĉu utilos kaj eblos apartigi jure TEJO-n disde UEA.

La eksteraj rilatoj de TEJO daŭris intensaj, kvankam ilian prizorgon foje bremsis manko de aktivuloj. En Eŭropa Junulara Forumo TEJO pledis forte por vera tut-eŭropeco de la Forumo kaj havis gvidan rolon en la alianco por tiu celo. TEJO aktivis ankaŭ en la Junulara Fakoj de Konsilio de Eŭropo, kie ĝi povis influi al redukto de la minaco ke el la planata restrukturado de la junulara laboro de KdE sekvos organizaj kaj financaj malavantaĝoj por junularaj organizaĵoj.

Kun financa subteno de Eŭropa Junulara Fondaĵo, TEJO seminariis pri la informada temo "Aŭdigi niajn voĉojn" (Budapeŝto, 27 apr. - 4 majo, 38 partoprenantoj) kaj "Edukado al paco" (La Chaux-de-Fonds, 4-11 okt., 30 partoprenantoj), ĉi-lastata subtenita ankaŭ de la svisa Fondaĵo Renkonto 2001.

Eldonaĵoj

La novajbultenon *TEJO Tutmonde* ekredaktis post Kalle Kniivilä, ekde n-ro 4/1997, Rick Newsum. Kiel novan redaktoron de *Kontakto* la estraro elektis Sabira Ståhlberg, komence por la jaro 1998. En redakto de Sjoerd Bosga aperis angle, france kaj hispane unu numero de la por-ekstera informilo *Dialog'*.

Fine de la jaro aperis Pasporta Servo, la listo de gastigantoj de TEJO, kun 871 adresoj en 15 landoj.

Detalan jarraporton de TEJO vd. en TEJO Tutmonde 3/1998. ■

mentado

Estrarano: Fettes

Interlingvistika

t.e. la studadon kaj plibonigon de internaciaj normoj pri lingvaj rilatoj. Por tiaj esploroj nepras fidindaj kaj profundaj studoj pri Esperanto mem, al kiuj CED kontribuis per la aperigo de plia ero en sia serio ĉe University Press of America, *Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language*, redaktita de Humphrey Tonkin. Kun



Foto: komplezo de I. Gulyás

Spezokonto

* Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj.

Kostoj

Rezulto		Buĝeto	Rezulto
1996		1997	1997
481247	Salajroj	497000	490860
84471	Socia asekuro	97000	93574
17542	Suplementoj	20500	12156
1723	Kafo, teo, lakto	2000	1794
-4819	Malsankompenso	0	0
7000	Pensiaranĝo	5000	7000
587164	Salajroj ktp, nete	621500	605384
10554	Afranko, nete	19500	10195
6044	Telekomunikiloj	6000	6074
5843	Presajoj	8000	5319
5582	Materialoj	7000	5957
6403	Maŝinoj, riparo/prizorgo	7000	6324
1500	Revizoro	1500	1500
1211	Administraj kostoj	700	1269
7390	Kopiado	7000	6302
-5992	Kopiado (vendoj)	-5000	-3747
38535	Centra Oficejo, nete	51700	39193
11162	Gasoj, elektro	13000	10829
551	Akvo	700	1242
1410	Riparo de la Domo	1600	234
7728	Purigado	8000	7828
6093	Asekuro	6300	6120
3351	Impostoj je la Domo	2500	3280
-2117	Luo ricevita	-1500	-1541
28178	Oficeja Domo, nete	30600	27992
36540	Preskostoj <i>Esperanto</i>	38000	36180
23317	Grafiko	24000	23858
51738	Dissendo/kovertoj	56000	50300
-10455	Anoncoj	-11000	-5750
101140	<i>Esperanto</i> , nete	107000	104588
14637	Preskostoj Jarlibro	22000	15794
19409	Afranko/ekspedo	19000	16513
3844	Grafiko	5500	4420
1435	Kovertoj	1500	1441
-15991	Anoncoj	-16000	-14567
23334	Jarlibro, nete	32000	23601

12950	Preskostoj <i>Kontakto</i>	13500	12816
9402	Dissendo/kovertoj	8700	9277
8670	Grafiko	10500	7360
13000	Redakto	13000	13000
-591	Anoncoj	-600	-16
43431	<i>Kontakto</i> , nete	45100	42437
11268	Estraro (vojaĝado)	12000	12916
2303	Estraro (korespondado)	3000	1605
2675	Oficistoj (vojaĝado)	5000	5208
2095	Vojaĝado (UK)	5000	3631
18341	Vojaĝoj/korespondado	25000	23360
3000	Edukado	3000	3000
2445	Informado	3500	3029
3398	Eksteraj rilatoj	1000	1478
1987	Komisiitoj, vojaĝoj	1000	1631
726	Komisiitoj, korespondado	500	120
11556	Movada evoluigo	9000	9258
2337	Bankokostoj	3400	2605
-7455	Kurzdiferencoj	0	-6804
3178	Reprezentado	5000	3707
-5470	Antaŭaj jaroj	0	-21
88	Diversaj kostoj	500	79
-7322	Ĝeneralaj kostoj	8900	-434
6744	Amortizo, domo	6800	6609
3816	Amortizo, aparatoj/mebloj	4100	3122
1055	Amortizo, telefonsistemo	800	791
13750	Amortizo, komputiloj	11000	10067
7443	Amortizo, programaro	6000	5715
32808	Amortizo entute	28700	26304
877165	Sumo de la kostoj	959500	901683

Rimedo

Rezulto		Buĝeto	Rezulto
1996		1997	1997
5578	Membroj Gvidlibro	5500	5905
50057	Membroj Jarlibro	47500	43501
251802	Membroj-Abonantoj	270000	265596
46657	Dumvivaj Membroj	68000	66780
15210	Membroj Jarlibro (junaj)	11750	17030
20522	Membroj-Abonantoj (junaj)	20750	17103
389826	Kotizoj de individuaj membroj	423500	415915
18302	Aligitaj membroj	18000	18623
3407	Aligitaj membroj junaj	4000	3703
8414	Abonoj <i>Esperanto</i>	9000	9342
1140	Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i>	1500	1029
15574	Abonoj <i>Kontakto</i>	15000	15258
7759	Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i>	7000	7561
44669	Societo Zamenhof	41000	44942
6014	Fakaj Organizaĵoj	6000	6200
-7558	pago al TEJO	-7000	-7819
487547	Kotizoj	518000	514754
276796	Vendoj de la Libroservo	260000	260378
-178479	Kosto de varoj venditaj	-159300	-175140
98317	Libroservo, malnete	100700	85238
-5000	Katalogokostoj	-4000	-4000
-2382	al stokrezervo	-2200	-2399
4734	Abonfako	5000	4481
95669	Libroservo, nete	99500	83320




En 1997 242 esperantistoj subtenis la agadon de UEA per aliĝo al


Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en 1997 estis bela SZ-ŝlosilujo. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.





KOSTOJ DE UEA EN 1997



RIMEDOJ DE UEA EN 1997

30819	Vendoj de Eldona Fakoj	27000	38665
-10073	Aldonoj (novaj libroj)	-5000	-29163
-8635	Ŝanĝo stokvalora	-11500	8783
-3883	Al stokrezervo	-4200	-3885
-2852	Tantiemoj	-1400	-1493
5376	Eldona Fakoj, nete	4900	12907
50855	Grafikaj servoj CO	52000	49362
20339	Aliaj servoj CO	18000	20235
1500	Institucio Hodler	1500	1500
34000	Kompenso Propaganda Konto	30500	30500
106694	Servoj kaj Kompensoj	102000	101597
164252	Kotizoprocenĝo UK	100000	82373
-47000	Rezervo	26000	24500
2579	Turismo	50000	24103
25717	Rento, nete	28000	24707
10829	Donacoj al la Ĝenerala Kaso	10000	10800
2203	Aliaj enspezoj	1600	2863
158580	Diversaj enspezoj entute	215600	169346
853866	Sumo de la rimedoj	939500	881924
23299	Saldo	20000	19759
877165	Sumo de la kostoj	959500	901683

Ricevotaj rimedoj	118207	107439
Antaŭpagitaj kostoj	9763	10990
Debitoroj	243559	222527
Debitoroj ktp entute	371529	340956
Ŝparkontoj kaj deponoj	1501039	1422188
Kurantaj bankokontoj	197138	216861
Kasoj diversaj	4679	5418
Kasoj/bankokontoj entute	1702856	1644467
Sumo de la aktivoj	5321886	5793303

Pasivoj

Kapitalo	358458	451572
Saldo de spezokonto	-23299	-19759
Kapitalo Azio	601443	739261
Kapitalo, Ĝenerala kaj Azio	936602	1171074
Kapitalo Dumvivaj Membroj	899482	1096443
Rezervo, debitoraro	21877	23229
Kongresa Rezervo	117486	115279
Rezervo IJK	25000	16667
Rezervo, emeritaj oficistoj	82356	92468
Aliaj sumoj rezervitaj	79399	106097
Rezervoj entute	326118	353740
Apogo Thorsen	-	32639
Belarta Fondaĵo	136166	144966
Fondaĵo Afriko	3491	1564
Fondaĵo Ameriko	37538	39881
Fondaĵo Azio	-3441	1661
Fondaĵo Biblioteko	19517	19711
Fondaĵo Canuto	5951	6544
Fondaĵo Grabowski	52963	69520
Fondaĵo Junularo	20865	17000
Fondaĵo Saliko	74045	56925
Fondaĵo Wüster	3418	3418
Konto Espero	13671	13906
Propaganda Konto	77456	18180
Triamonda Kongresa Fondaĵo	63985	68246
Volontula Fondaĵo	69014	68156
Fondaĵoj entute	574639	562317
Antaŭricevitaj rimedoj	183312	245749
Pagotaj kostoj	76598	54650
Pendantaj spezoj	5371	12818
Kreditoroj	1448164	1332762
Deponoj de membroj	871600	963750
Kreditoroj k.s. entute	2585045	2609729
Sumo de la pasivoj	5321886	5793303

Bilanco

* Por komparo aperas ankaŭ la stato fine de 1996.

Aktivoj		1996	1997
Domo, Roterdamo	330436	323828	
Tereno Aspremont	1	1	
Nemoveblaĵoj	330437	323829	
Ekipaĵoj kaj mebloj	20220	16949	
Komputilaj aparatoj	32088	23488	
Programaro	22330	17146	
Telefonsistemo	3164	2373	
En Novjorko	1	1	
Maŝinaro ktp	77803	59957	
Blokitaĵoj monrimedoj	3473	3795	
Akcioj	524968	764194	
Obligacioj	755600	881450	
Miksaj	920604	1139387	
Valorpaperoj entute	2201172	2785031	
Stokoj libroservaj	238191	239847	
Stokoj, Eldona Fakoj	388281	388449	
Stokrezervo	-8698	-6367	
Presaj, materialoj k.s.	16842	13339	
Provizoj entute	634616	635268	

FINO DE LA ESTRARA RAPORTO 1997



• Bulgario: E-kurso teletekste

En decembro 1997 kaj marto ĉi-jara la bulgara televido Sedem Dni publikigis, sur preskaŭ 150 teletekstaj paĝoj, 12-lecionan Esperanto-kurson por komencantoj. La kurso vekis konsiderindan intereson. Sedem Dni, kies teleteksto atingas pli ol 500 mil spektantojn, plu pretas disponigi paĝojn por Esperanto. La prizorgantoj de la E-paĝaro, eldonejo Interpres kaj ties prezidanto Mariana Evlogieva, bonvenigas ideojn por pliriĉigi la enhavon: Drushba-2, PK 18, BG-1582 Sofio, Bulgario; interpres@bis.bg.

• Italio: Eŭropa revuo

Eŭropan revuon en Esperanto intencas eldoni la esperantista teamo Prometeo en Napolo. Por n-ro 1, sendu viajn anoncojn (senpagajn ĝis 25 vortoj) al [+39/81/551-33-50](tel:+39/81/551-33-50).

• Japanio: Lingvaj rajtoj

Por novembro Japana E-Instituto planas simpozion pri lingvaj rajtoj. Estos invititaj reprezentantoj de lingvaj malplimultoj en Japanio. (Kimura G.)

• Jugoslavio: Danuba rendevuo

Ĉirkaŭ 140 esperantistoj el Bulgario, Hungario kaj Jugoslavio kunvenis en Beogrado por la Kvara Danuba E-Rendevuo (20-22 marto). La riĉa kultura programo inkluzivis la teatraĵojn *Budapeŝta ekzameno* (S. Szathmári), *Lingva evoluo* (J. Baghy) kaj *La vorta klaso* (G. Silber), ludatajn de la bulgaraj aktoroj de la Teatro-Fako de LF-Koop. Samokaze estis prezentita la freŝe presita, 500-paĝa *Antologio de la serba poezio 1200-2000* de Srđ Arandjelović. (P. Arnaudov)

• Kroatio: Nova nomo, nova mono

En sia jarkunveno decembre, Kroatia Esperanto-Ligo decidis ŝanĝi sian nomon al Kroata Esperanto-Ligo. KEL konsilis al la alia tutlanda E-organizaĵo, Kroata E-ista Unuiĝo, registri sin kun aldona nom-atributo (ekz. "Katolika"). Tri televid-elsendoj rilatis al Esperanto en februaro: Ivo Boro-



Brazilo: Ĉefurba spaliro

Esperanto-Asocio de Brasília (la ĉefurbo) havas novan estraron ekde la 7-a de marto: prezidas Lício de Almeida Castro (de maldekstre: 3.), vicprezidas Valter de Campos (7.), sekretario estas Hamilton Caetano de Souza (1.), kaj kasisto Paulo Henrique da Costa Gonçalves (4.). Plie informas ilia hejmpaĝo: <http://www.geocities.com/Athens/Academy/1887/>.

veĉki, Spomenka Štimatec kaj Judita Rey-Hudeček gastis en diversaj kulturaj programoj, kiuj nature enkadrigis Esperanton en ali-teman elsendon.

Tri specialaj moneroj je valoro de 25 kunaĵoj trovas lastatempe favoron ĉe kroataj numismatoj, inter ili la Esperanta monero eldonita okaze de la Unua kongreso de kroataj esperan-

tistoj (21,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA).

La ĉefa prelego de tiu sama kongreso, "La lingva problemaro en la moderna mondo" de KEL-prezidanto prof. Dalibor Brozović, aperis en la luksa, 600-paĝa revuo *Kolo* de la prestiĝa kultura organizaĵo Matica Hrvatska. (*Tempo*, Kroata E-Ligo)



• Gorbaĉov: Vizitita de AIS

Dum sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj en Moskvo (22-29 marto), delegacio de AIS, gvidata de prof. Helmar Frank, renkontis Miĥail Gorbaĉov en lokalo de ties fondaĵo. Kiel konate (nov. '96, p. 198), la lasta sovetia gvidinto estas ekde 1996 profesoro de AIS. Gorbaĉov salutis la klopodojn de AIS kaj de Eŭropa Klubo, kiuj instigas komunikadon pere de

neŭtrala lingvo. "Ĉiu kulturo, eĉ la plej malgranda, estas konservinda" — li diris. Gorbaĉov montris sin impresita de la 14-lingva kalendaro de Eŭropa Klubo, kiun transdonis al li la redaktinto, Věra Barandovská-Frank. (*Eŭropa Dokumentaro*)

Tuinder: Pro kavalireca helpo

Delegito de UEA pri ekumenismo kaj porblindula helpo, la nederlandano Jacques Tuinder ricevis la 29-an de aprilo pro sia "batalo kontraŭ blindeco kaj vidhandikapo en evolulandoj", daŭranta jam 32 jarojn, la reĝinan distingon "kavaliro en la ordeno de Oranje-Nassau" el la manoj de la urbestro de Heemskerk

Fake



• Blinduloj: Konferenca lingvo

Cento da partoprenantoj — i.a. Jurij Smolin, vic-estro de la parlamenta komisiono pri scienco kaj klerigado — spertis la funkciadon de Esperanto kiel unu el la laborlingvoj de internacia konferenco pri “Daŭra klerigo de homoj kun difekta vidkapablo — rimedo por integrado en la modernan socion” (Niĵnij Novgorod, Rusio, 17-20 apr.). Konferenca rezolucio rekomendas pluan uzon de Esperanto kiel laborlingvo kaj ĝian instruadon en lernejoj por blinduloj. En Baku jam la 5-an de majo ekfunkciis, laŭ propono de la delegacio el Azerbajĝano, E-kurso por blinduloj. (Ŝ. Mamedov)

• Informado: Dana intervjuo-ludo

Dana E-Asocio aranĝis semajnfinojn (17-18 jan.) kolokvon pri informado en Kopenhago. Ĉirkaŭ 15 personoj lernis de profesia ĵurnalisto Henning Dögger, kaj de esperantistoj Preben Bagger kaj Ib Schleicher, kiel rapide kaj adekvate respondi al ĵurnalistoj. Kim Hendriksen gvidis ludon pri intervjuado. (*Esperanto en Danlando*)

Luis Carreto Clavo, prezidanto de Kordova Entreprenista Konfederacio (Hispanio), aperigis la 5-an de februaro longan artikolon en la ĵurnalo

Córdoba pri Zamenhof kaj la unuaj jaroj de la Esperanto-movado. (*Gazeto Andaluza*)

• Komerco: IKEF-TAKE kunlaboro

Estraranoj de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo kaj de Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj decidis en laborkunveno (26 apr., Orienta Francio) pri pli kaj pli intensa kunlaborado de la du asocioj, kiuj rendevuos interesatajn kongresanojn en Montpeliero. (E. Ludwig)

• Literaturo: Beletraj babiloj

Dum la Montpeliera UK la ibera rondo de verkemuloj renkontos unu la alian kaj ĉiun interesiganton pri literaturo ekster la oficiala programo de la UK, en beletraj babilrondoj. (J. Camacho)

• Turismo: Mendu el Forchheim

La Esperanto-grupo en Forchheim atingis ĉe la urbaj instancoj eldonon de broŝuro parte Esperantlingva. Petu ĉe: Tourist-Info, Rathaus, DE-91301 Forchheim, Germanio. (B. Maurer)

• ZEO-j: En Francio kaj Hispanio

Atendataj inaŭguroj en Francio: rondplaco D-ro Zamenhof en La Rochesur-Yon, aleo Esperanto en St-Sornin kaj aleo Zamenhof en St-André-de-Cubzac. (*Espéranto Ile-de-France*)

Okaze de la 9-a Kongreso de Valencio kaj Murcio (4-5 apr.) en Castellón, oni inaŭguris en nova loĝkvartalo placon Esperanto kun monumento montranta malfermitajn manojn kaj la devizon “universala lingvo”, verko de la loka ŝtontajlisto Francisco Agut. (J.A. Cabezas)

Masaĝo: Tuŝanta sceno

Fakdelegito pri masaĝo en Douala (Kamerunio), Louis Bakemhe pritraktas gambon de Blaise Bapa, samurba esperantisto, kiu ankaŭ vivtenas sin per Yumeiho-masaĝo, lernita per Esperanto. (B. Bapa)




Foto komplezo de Blaise Bapa

• Harrison: Inventis Esperanton?

La fama usona sciencfikcia verkisto Harry Harrison, Honora Patrono de UEA, vizitis Moskvon kaj Sankt-Peterburgon komence de majo. La verkoj de Harrison ofte mencias Esperanton, kaj multaj informpetas de Rusia E-

ista Unio pro tiuj mencioj. La E-tradukoj de liaj *La stratoj de Aŝkelono* kaj *Naskiĝo de la rustimuna ŝtatrato* aperis ĝuste en Rusio, ĉe Sezonoj.

Post renkontiĝo kun legantoj en Moskva librovendejo la 3-an de majo, ĉiuj gazetraportoj menciis lian espe-

rantistecon; la ĵurnalo *Komsomolskaja pravda* eĉ asertis ke Harrison estas “unu el la kreintoj de Esperanto”. Tridekon da esperantistoj Harrison aparte renkontis la 9-an de majo kaj en flua Esperanto respondis al ĉiuj demandoj. (N. Gudskov)



Jacques Tuinder kun sia edzino en la dekoracia ceremonio

Foto: Ton Verschoor

(cetere edzo de esperantistino). La agado “Evidente” de Tuinder aktivis lastatempe precipe en Albanio (vd. jan., p. 5) kaj en Jugoslavio, kiun li vizitis komence de aprilo pro helpoprogramo favore al la bombovundita Branka Pešić (vd. okt. ‘97, p. 170). Pluaj monhelpoj por Pešić aŭ por aliaj agadoj de “Evidente” bonvenas ĉe la UEA-konto “jajt-s”.

UK Ĝis la 20-a de majo al la Montpeliera UK (1-8 aŭg.) aliĝis 2682 personoj el 65 landoj.

Praga Manifesto

Ĝis redaktotfino la nombro de subskriboj atingis


11 111.

Al interkulturo per Esperanto

Fine de la Montpelliera UK okazos simpozio "Lingva politiko kaj interkultura eduko" kun subteno de Unesko. Pri kio indos diskuti tie por veni al konkretaj planoj realigeblaj?

Ĉiam pli multaj homoj migras de sia naskiĝloko al fremda laborlando, kiel “gastlaboristoj” aŭ fakuloj. En tiaj moviĝoj kontaktiĝas diversaj kulturoj kaj lingvoj: gastlaboristoj devas lerni la lingvon de la “gastiga” lando, ekkoni ties mo-

Ja en televidoj kaj Interreto abundas (pseŭdo-)anglalingvaĵoj. Sed kioma ondo de la naciaj televidoj ankoraŭ dissendas loklingve? Kiom da paroloj oni ankoraŭ interpretas? Ĉu proporcio kreskas aŭ malkreskas la kvanto de neanglalingvaj interretejoj? Ne faci-



Nunaj ĉef-fluoj de migrado pro laboro

Fonto: Internacia Labor-Oficejo (*Unesco Sources*, jan. 1998)

rojn, adaptiĝi al la medio. Male, la “kunhelpantaj” fakuloj ofte postulas ke la “helpatoj” lernu komunikadi kun ili.

Ĉiam pli ofte kaj amase, la translokiĝoj malprovizoriĝas pro venigo de familo aŭ starigo de nova familo pluretna. Kreskas la ĉeesto de “enmigrintaj” lernejoj alilingvaj, kaj tiklaj problemoj pri ilia “integrado”.

Mensa migrado: en la angla?

Samtempe la komunikaj teknologioj ebligas ke piedpilkaj zelotoj spektu alikontinentan ludadon el mola fotelo, dum la gefiloj Interrete babilas kun trans-oceanaj samaĝuloj. Laborkomisionoj de internaciaj organizaĵoj (i.a. de UEA kaj ILEI) senvojaĝe kunsidas (ĉu *dissidas*?) pere de retpoŝto. Eĉ en lernejoj geknaboj trarete esploras forajn datumbankojn kaj debatas kun alilandaj klasoj por produkti disertaĵetojn.

Kiulingve okazas tiaj mensaj migra-
doj? “Angle!” — ĥoras la nunaj amas-
komunikilaj opiniigistoj. Ĉu vere?

las trovi pretajn kaj fidindajn respondojn al tiuj demandoj. Sed verŝajne la emo al nur-angla “tergloba vilaĝo” estas nur unu el la nun observeblaj tendencoj, kiu konkurencas kun aliaj emoj al diverskulturaj identiĝoj.

Kien la lernejoj?

Ĉiaj foraj migradoj, ĉu korpaj ĉu mensaj, interkontaktigas fremdajn kulturojn, kun alprunto aŭ kolizio de vivmodeloj, kun reciproka interŝanĝado aŭ hegemonia altrudado. Kiel sintenu la landaj lernejoj sistemoj ĉe tiaj ŝanĝiĝoj kaj perspektivoj?

En la pasinta kaj nuna jarcentoj ili celis reprodukti siajn sociojn, konservante la lokajn ecojn. Oni ja lernis iom da fremdaj lingvoj, sed sen profunda kaj konscia pripenso pri ties elekto, kaj multloke kun malgranda efiko.

Ĉu, kaj eventuale kiel, la lernejoj de la “tria jarmilo” ŝanĝiĝu, konsidere la ĉiam pli vastajn kaj intensajn kulturajn kontaktojn, influojn kaj miksiĝojn?

Konscie aŭ malkonscie oni povas ŝanĝi ilin en diversaj direktoj.

La “natura” direkto estas la simpla alproprigo de kulturaĵoj (inkluzive la lingvon) de la plej forta lando aŭ landaro, kun sekva pli-malpli rapida perdo de lokaj kulturaj radikoj kaj tradicioj. Iuj laŭmodaj edukpolitikistoj eĉ proponas solvi la problemon de historia kaj geografia instruado al la nunaj plur-etnaj klasoj simple *ne plu* instruante tiujn fakojn, konsiderante nur la *nunon kaj ĉeon*.

Aliaj edukmodeloj “malnaturaj”, elpensindaj, agnoskas *plurecon* de kulturoj, lingvoj, historioj kaj geografiaj: temas pri modeloj — grandparte ankoraŭ evoluigitaj — esprimataj per la nomo *interkultura edukado*. Difinitiajn studplanojn estas malfacilega defio, kiu krome devas defendiĝi fronte al la nature imperiismaj modeloj.

Rolo por Esperanto

Ĉe Esperanto-parolantoj principe malnecesas pledi por defendo de plurlingveco kaj interkultura edukado. Sed ofte ni proponas la solvon Esperanto por “la monda lingva problemo”, kiun la homaro ankoraŭ ne klare konscias.

Aliflanke, en la landaj kaj interlandaj medioj (Unesko, EU ktp.) kiuj okupiĝas pri edukado, oni ekstarigis la supre skizitan problemaron, nomatan *interkultura edukado*.

Jen granda okazo por la esperantistaro komune prilabori edukprojekto(j)n pri fakta interkultura edukado helpe de Esperanto kaj prezenti ĝin/ilin al lernejaraj instancoj naciaj kaj internaciaj por aprobo kaj subteno. Temas pri propono de Esperanto kiel efika “komunikilo” kun alilandaj lernejoj kaj edukrimedo kiu malfermas la mensojn al *multaj* kulturoj.

Fine de la Montpeliera UK okazos (7-8 aŭg.) simpozio pri “Lingva politiko kaj interkultura eduko” kun subteno de Unesko. Ĉu ne ekdiskuti tie pri konkretaj planoj, realigeblaj per niaj modestaj fortoj? (Tamen niaj *lernejaj* fortoj ne estas sensignifaj: vidu ekz. la paĝaron *Esperanto en lernejoj*: <http://www.uniroma3.it/LPS/esp/eler/>).


Krom en la Unesko-simpozio, ni elaboru proponojn ankaŭ en niaj pri-
edukaj gazetoj (*IPR*, *Juna Amiko*,
ICEM-Esperanto ktp) kaj en Interretaj
diskutejoj.

Ek al interkulturo per Esperanto!

Mauro La Torre

✉ *m.latorre@uniroma3.it*

Laste aperis



Domaine de la recherche en linguistique appliquée. Deuxième Colloque d'Interlinguistique: CDELI - La Chaux-de-Fonds.

Red. Tazio Carlevaro. Bellinzona: Hans Dubois, 1998. 235p. ISBN 88 87282 09 9. 21cm. En Esperanto kaj la franca. Kontribuoj al interlingvistika seminario (1996): Barandovská-Frank, Blanke, Carlevaro, Chmielik, Dankova-Stackler, Favre, Gacond, Künzli, Silber. 34,20 gld.

Elementa kurslibro de Esperanto (1980). Cho Sung Ho (1956). Seulo: Korea E-Asocio, 1998 (6-a eld.). 45p. 26cm. Por kore-lingvanoj. 6,00 gld.

Esperanto: Die internasionale taal. 'n Gids vir selfstudie of die klaskamer. [Kaaipstad]: La E-Asocio de Suda Afriko, 1994. 96p. ISBN 0 620 19064 7. 28cm. Lemo-libro por afrikans-lingvaj komen-cantoj. 15,00 gld.

Esperanto simple. Kurso de internacia lingvo en 7 lecionoj / Kratkij kurs meĵdunarodnogo jazyka esperanto v semi urokah. Lilia Fabretto (1930). El la itala trad. Bronislav Ĉupin. Jekaterin-burg: Ruslanda E-isto, 1998. 55p. 20cm. Ilus. 6,90 gld.

Familio sava. Lilia Nikolova. Sofio/Razgrad: Socio kaj E-o/E-ista domo de kulturo, 1997. 24p. ISBN 954 8739 08 9. 14cm. Dens-lingvajaj poemoj pri Bulgario, Esperanto, familio kaj amo. 3,00 gld.

Kaliopa. Poemo (1900). Pejo Javorov (1878-1914). El la bulgara trad. Canko Ignev. Sofio: Socio kaj Esperanto, 1997. 22p. 20cm. Longa poemo de popola inspiro. Kun studo de la tradukinto. 4,50 gld.

Kantu ja Cion. Poemoj el la Sankta Lando. Jerusalemo: Centro Sivron, 1998/5758. 80p. 21cm. 72 poemoj de E. Baraka, J. Gišron, D. Mager, J. Kohen-Cedek k.a. 16,50 gld.

Krucumoj. Penka Papazova. Sofio: Pres-Esperanto, 1992. 28p. 17cm. Intima poemaro: intensaj sentoj kaj imperativoj. 3,00 gld.

Lasta eliro, La. Fino de la tempoj; Tria jarmilo. (1993). Mauro Fonseca. El la portugala trad. Ruy de Albuquerque. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1998 (neind.). 78p. 21cm. Indikoj bibliaj kaj

spiritismaj pri proksimiĝanta katastrofo tut-monda. 12,00 gld.

Lingvo de mia kor' Esperanto, La. Davud Ŝams Hakimi. Tehran: Atai, 1997. 16p. ISBN 964 6350 05 4. 24cm. Perslingva. 53 poemoj. 4,80 gld.

Moneta Europea — Lingua Europea — Federazione Europea. Andrea Chiti-Batelli. Roma: Piero Lacaita, 1998. 64p. 19cm. Ital-



Esperantan kulturon transportas ne nur inko kaj papero.

lingva. Pri la bezono je eŭropaj mono, lingvo kaj federacio komunaj. 6,00 gld.

Mumkin. Stephen Cosgrove. El la angla trad. F. Faraĝi. Tehran: Atai, 1997. 32p. 21cm. Trilingva: angla, E-a, persa. Ilus. Solema ĉevalo revenas al la komunumo. 9,90 gld.

Nikola Aleksiev: Biobibliografio. Dimo Martinov (1915). Red. Venelin Mitev. Sofio: Socio kaj Esperanto, 1998. 39p. ISBN 954 8739 11 9. 21cm. Biografio kaj elĉerpa bibliografio de bulgara veterano. 6,00 gld.

Nur la tempo revenas neniam. *Liriko.* Penka Papazova. Jambol: Kresĉendo, 1996. 47p. ISBN 954 615 020 7. 20cm. Poemoj de soleca animo, kies "spirito revenas al la homoj". 6,00 gld.

Okcidenta-orienta akrido, La. William P. Vathis (1921). Spokane: la aŭtoro, 1997. 50p. 22cm. Memoraĵoj de usona diplomato pri junaĝaj travivaĵoj en Usono, Honkongo kaj Japanio (1936-54). 7,50 gld.

Posteuloj de Ahasvero. Georgi Miĥajlov. Sofio: Socio kaj Esperanto, 1997. 71p. ISBN 954 8739 09 7. 20cm. Vivospertoj de bulgara cirkisto el la jaroj 1965-72. 9,00 gld.

Somero jam foriris, La. Nikolao Stranĝanski (1932). Sofio: Pres-Esperanto, 1991. 30p. 17cm. Sonetoj en formo originale modifita; manpleno da tradukoj el la bulgara. 3,00 gld.

KASEDOJ

Sankta fajreto, La. Kantas Valentinas Ĉepkus (1937). Kaunas, 1997. 14 kantoj: duono Esperante, duono litove. 18,00 gld.

Vi memoru pri ĝardenoj. Jadwiga. Kraków: la aŭtoro, 1997. 12 kanzonoj diverstoj: melankoliaj, amuzaj, kabaredaj. 22,50 gld.

VIDBENDOJ

En somera vilao. Amuza rakonto pri geedzoj kiuj ferias en somera vilao. Bazita sur novelo de Anton Ĉehov. Scenaro: Hisasi Kitagawa kaj Aleksandra Watanuki; reĝisoro: A. Watanuki. Tokio: Tokia E-Grupo "Vilaanoj", 1998. 40 min. NTSC aŭ PAL. Kun akompanaj scenaro kaj kajereto, i.a. pri instrucela utiligo. 48,00 gld.

Eta knabino, La. Samir. Zürich: Dschoint Ventschr AG, 1997. Ĉ. 8 min. PAL. E-lingva kun anglaj subtitoloj. Internacie sukcesa fabelo pri "solidareco de malsamaj estaĵoj" (marto, p. 58.). 39,00 gld.



MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Alphonse Daudet:

Tre mirigaj aventuroj de TARTARIN DE TARASKONO

La Libroservo de UEA ankoraŭ havas kvanton de tiu ĉi humura majstroverko!

192 p., tole bind., ilustr. 18 gld., triona rabato ekde 3 ekz.



WINNIE-LA-PU

...en Esperanto!



Traduko de Ivy Kellerman Reed kaj Ralph A. Lewin kun enkonduko kaj vortolisto por anglalingvanoj. Ilustraĵoj de Ernest H. Shepard.

Eldonis UEA: 1992. Tole bindita kun kromkovrilo. Prezo: 27,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Nekrologoj

Jenneke DUNNEWOLD-EHRMANN (1904-1998), dumviva membro, mecenato, forpasis la 3-an de aprilo en Hago.

Roland GRANDIÈRE (1921-1998) mortis la 17-an de marto en Villemomble apud Parizo. Li estis ĝenerala konsilanto de SAT kaj — de 1957 ĝis 1997 — prezidanto de SAT-Amikaro, ties landa asocio en Francio, kiu dum lia multjara gvidado spertis konstantan kreskon kaj plian agnoskon en kaj ekstermovade por ĝia laboro.

Robert HARDING forpasis la 7-an de aprilo en Napier (Nov-Zelando), kie li funkciis jardekojn kiel delegito kaj kiel fakdelegito pri dom-konstruado kaj rozkultivado. Li estis dumviva membro de UEA, mecenato.

Karin LARSSON (1919-1997), kasistino de Kristana Esperantista Ligo Internacia (1948-55), poste estrarano de ties sveda sekcio, mortis la 16-an de novembro en Tumla (Svedio). Ŝi membris 50 jarojn en UEA kaj longe servis kiel fakdelegito pri kristanismo.



Hristo Marinov

Hristo MARINOV (1921-1997), ekologiisto kaj fakulo pri regiona ekonomio, forpasis la 3-an de decembro en Sofio. Esperantisto ekde siaj gimnaziaj jaroj, prof. Marinov kunaŭtoris la monografion *La evoluo de la trafiko kaj ĝia polucio* (1984), redaktis kaj kunverkis la ampleksan esearon *Ekofuturo* (1984) kaj publikigis multajn E-lingvajn artikolojn sciencajn.

Marinov prelegis dum Someraj Universitataj Kursoj (*Sociekonomiaj problemoj de ekologio*, 1981), Internaciaj Kongresaj Universitatoj k.a. Li estis unu el la fondintoj, kaj poste vicprezidanto, de Fondaĵo "Socio kaj Esperanto".



Lucien Péraire propagandas dum sia bicikla mondvojaĝo.

Lucien PÉRAIRE, konata pro sia bicikla vojaĝo ĉirkaŭmonda (1928-32), kiun li rakontis en *Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto* (1974, 1990), mortis antaŭ kelka tempo en Francio.

OFICIALA INFORMILO

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Francio: Michèle Abada-Simon.

PATRONOJ DE TEJO 1998

Argentino: Atilio Orellana Rojas. Francio: Denise M.H. Loisel; Geneviève Dinard; Paul Samain. Kanado: Brian D. Kaneen. Usono: L.A. Walther.

DONACIOJ 1998 (NLG)

ĝis la 30-a de aprilo

Asocia Kapitalo: Nederlando: legaco M.C.J. v.d. Graaf 500,00; J. Poptie gratule al la 90-jara UEA 9000,00; Nov-Zelando: heredaĵo A.V.T. Harding 5613,66. Sumo ĉi-jara: 15 113,66.

Fondaĵo Afriko: Nederlando: A.J. ten Hagen 2588,00. Sumo ĉi-jara 5321,84.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: M. Almada 50,00. Kanado: Libro servo de Kanada Esperanto-Asocio 140,05. Nederlando: N.C. Kuiterman 100,00; R. Moerbeek 100,00. Sumo ĉi-jara 534,89.

Fondaĵo Azio: Japanio: Y. Hotta 30,94; K. Huzimaki 30,94; Y. Itou 61,88; T. Iwai 30,94; K. Kai 61,88; E. Kimura 30,94; S. Kitagawa 30,94; K. Kosaka 30,94; S. Minaba 30,94; Mijazaki E-Societo 30,94; S. Nagura 154,70; T. Nisio 77,35; H. Okuda 30,94; T. Oohara 30,94; Y. Oozato 30,94; K. Sasanuma 30,94; M. Tamura 60,64; M. Toyoda 46,41; S. Turuta 30,94; K. Tutiya 30,94; S. Yamamoto 30,94. Tajlando: F. Andreoni 19,55. Sumo ĉi-jara 1693,27.

Fondaĵo Canuto: Francio: M. Abada-Simon 67,20; C. Dehan 13,44; P. Hamon 6,72. Sumo ĉi-jara 6828,12.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Nederlando: E-Societo Merkurio 250,00; P. Schuil 200,00. Sumo ĉi-jara 450,00.

Junulara Fondaĵo: Francio: M. Feneyrol 1671,62. Sumo ĉi-jara 1794,20.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Norvegio: B.

Hekland 16,00. Sumo ĉi-jara 303,76.

Volontula Fondaĵo: Germanio: F. Huber 20,00. Sumo ĉi-jara 1478,11.

Kampanjo 2000: Bulgario: J. Verweij 50,00. Finnlando: T. Sormunen 300,00; Steleto: memoire pri N. Moerbeek 74,20. Germanio: H. Schindler 1000,00. Japanio: YAMASAKI S. 300,00. Korea Resp: N. Lee 58,61. Nederlando: J. Hoitsma 125,00. Norvegio: O. Bjørnsrud 34,40. Usono: Anonime 193,95. Venezuelo: J.E. Bachrich 400,00. Sumo ĉi-jara 7269,59.

Renovigo de la Domo: Nederlando: J. Calado 500,00. Sumo ĉi-jara 4500,00.

Ĝenerala Kaso: Germanio: W. Murza 9,00. Nederlando: R. Hoogendoorn 50,00; Fam. W.C. Keizer 100,00; Fam. Slot 250,00; S.A.K. van der Zee 25,00. Sumo ĉi-jara 2220,09.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-765-0880 [h], +82-53-652-4488 [of]; ✉ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐ lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ✉ +39-6-39-72-61-69; ☐ mc8750@mcclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉ +31-50-3613763 [of]; ☐ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ✉ +1-613-565-9279; ☐ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-223748 [h], +370-7-209781 [of]; ✉ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉ +972-2-658-4437 [of]; ☐ amri@vms.huji.ac.il.

Komitato de UEA: Jarlibro 1997 enhavas liston de ĉiuj komitatanoj (vd. p. 15-19).

NOVAĴOJ


de la eldona fakto
de UEA

POR LERNI KAJ ARGUMENTI

**AL LINGVA DEMOKRATIO / TOWARDS LINGUISTIC
DEMOCRACY / VERS LA DÉMOCRATIE LINGUISTIQUE.**

**Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj,
Prago, 20-23 julio 1996. Mark Fettes kaj
Suzanne Bolduc (red.). Rotterdam: UEA, 1998. 212p.
ISBN 92 9017 054 9. 24cm. Prezo: 22,50 gld.**

Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj organizaĵoj utilas nur por
simbolaj politikaj celoj? Ĉu aktualaj modeloj de plurlingva
demokratio efektive diskriminacias? Kian rolon ludu lokaj
lingvoj en la solvado de mondaj problemoj? Kion eblas lerni el
la spertoj pri Esperanto? Jen temoj de la Nitobe-Simpozio en la
Prago UK, kies materialoj nun haveblas libroforme.
Ĉiu kontribuado en la originala lingvo (angla, franca aŭ
Esperanto), kun resumo en ĉiuj tri lingvoj.
La angla teksto de la pionira raporto "Esperanto kaj la lingva
demando ĉe Ligo de Nacioj" de NITOBÉ Inazô estas unuafoje
publikigita ĉi-libre.



RIKOLTO DE 50 JAROJ



PAJLEROJ KAJ STOPLOJ.
Elektitaj prozaĵoj. William
Auld. Rotterdam: UEA, 1997.
348p. ISBN 92 9017 052 2.
21cm. Prezo: 42,00 gld.

"La jaro 1997 signas la 50-
jarigon de mia serioza verkado
en Esperanto. La ĉefa rikolto de
tiu verkado estas la kvindek
de miaj libroj (ankoraŭ
plimultiĝonta) sur breto en mia
biblioteko. Sed post ĉiu
rikoltado postrestas surkampe
pajleroj kaj stoploj, kiujn oni
kutime forbalaas aŭ surtretas.
— Mi do decidis kolekti libro-

forme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur
efemeran, kaj jen la rezulto." (William Auld)

La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj,
Tradukoj, Libro-kulturo. Tre bela grafika prezento.

LIBRO DE UNESKO EN ESPERANTO!



**KULTURO KAJ
TEKNOLOGIO.**
Studo pri la jara
temo por 1997
de la Monda Jardeko de
Kultura Evoluigo.
Andrew O. Urevbu.
Trad. Johano Rapley.
Rotterdam: UEA, 1997. 64p.
ISBN 92 9017 053 0. 21 cm.
Prezo: 15,00 gld.

Analizo pri la rilato inter
kulturo kaj teknologio. Kiel
efikas kulturo sur teknologian
evoluo? Ĉu kultura evoluo
stimulas teknologian ŝanĝon?

Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj
taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro
la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio,
Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.



TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefono: +31 10 436 1044

Telefakso: +31 10 436 1751

Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

Memorilo honore al Bill kaj Cathy Schulze

Por honori Cathy je ŝia 85a naskiĝtago la 4an de novembro 1998, sendu historieton, seriozan aŭ humoran, en Esperanto aŭ la angla kaj/aŭ fotojn. Menciuj la jaron kaj okazon, se vi memoras — se ne, memoroj estas sentempaj. La celo estas ke ni ne perdu ĉion kion tutmonde faris Bill (m.1993) kaj Cathy Schulze por la Esperanto-movado. Poste libreto aperos. Sendu kiel eble plej rapide al: Dori Vallon Wheeler, P.O. Box 74, Goldendale WA 98620 Usono; dwheeler@gorge.net; ☎509-773-4177.

Cent jaroj (1896-1996) da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER


Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabuloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



SIMPLE LA PLEJ BONA!

SESA ELDONO DE LA INTERNACIA LERNOLIBRO




Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld. Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj bela kaj moderna diversa kaj amuza interesa por ĉiuj

KŜITAKTO estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KŜITAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! Ĉi-jare **KŜITAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1998

Aŭstralio	28 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	35 markoj	Norvegio	140 kronoj
Belgio	730 frankoj	Hispanio	2200 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	30 guldenoj	Portugalia	2400 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	32000 liroj	Svedio	150 kronoj
Danio	130 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	105 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

25-jara jubileo de ludovikito



En 1973 aperis la 160-paĝa volumo *Unuaj libroj por esperantistoj*. Dudek kvin jarojn poste, ni disponas pri ĉ. 25 000 paĝoj en 55 volumoj, kio senkonkurence estas la plej granda eldonprojekto iam entreprenita en la historio de la Esperanto-movado. Ĝi estas ankaŭ la plej luksa librokolekto pri kiu ni disponas. Kaj ĉio tio estas laboro de unu homo — ludovikito (Itō Kanzi), kiu meze de januaro festis sian 80-an datrevenon en Kioto. Jen skiza prezento de tiu monumenta zamenhofologia kolekto:

Parto unua:

Originalaro: Aperis 16 volumoj kun preskaŭ 5800 paĝoj.

Parto dua:

Tradukaro: Aperis 7 volumoj kun 4200 paĝoj.

Parto tria:

Kromkajeroj: Aperis 10 volumoj kun preskaŭ 3000 paĝoj.

Ludovikologia dokumentaro:

Aperis 19 volumoj kun pli ol 9200 paĝoj.

Konciza originalaro:

Aperis 3 volumoj kun pli ol 2900 paĝoj:

unua etapo de esperanto

1878-1895, 948p.

ĝis la homaranismo

1896-1906, 945p.

destino de ludovika dinastio

1907-1917, 988p.

ermitoj kuncelebris la majstron

kromkajero, 321p.

Petu kompletan liston ĉe la Libroservo de UEA. Mendu ĉe la libroservoj de UEA, ĤEI kaj KLEG. Por mendoj de pli ol 10 ekzempleroj de la sama volumo skribu al: Libroteko Tokio, 7-15, Nisinipori 3, Arakawa-ku, Tokio, 116-0013 Japanio; <syozik@qa2.so-net.or.jp>.



eldonejo ludovikito